

中國報


EL POPOLA

ĈINIO









INTER NI

Mi estas invalida virino loĝanta en resaniga centro Hrabynne, kie vivas centoj da invalidoj kun variaj diagnozoj. Mi interesiĝas pri via ĉigong-terapio kaj petas, ke vi pli detale priskribu en ia venonta EPĈ tiun ĉi metodon. Ĉu oni povas ellerni tiun ĉi metodon nur laŭ instrukcioj en via gazeto, aŭ ĉu tio eblas nur persone?

HELENA DIVÍLKOVÁ
(Ĉeĥoslovakio)

Laŭ peto de iuj legantoj ni aperigos en tiu ĉi jaro kelkajn artikolojn pri ĉigong-terapio kontraŭ artrito, stomakaj malsanoj, hepatito kaj neŭrastenio.

Kompreneble estas pli bone lerni ĉigong-on ĉe instruanto, sed ne ĉiuj havas tian okazon. Tial oni povus sin ekzerci laŭ la metodoj en EPĈ.

Ni rekomendas al niaj legantoj alian ĉinan korposanigan metodon masaĝo kun historio de pli ol 2 000 jaroj. Por faciligi lernadon, ni faris videobendon "Ĉina Masaĝo" (vidu mendilon en ĉi numero). Interesitoj mendu ĉe ni.

La Red.

Kiel deziron de la leganto mi menciis jenon: estu sur paĝoj de EPĈ iam grandaj konkursoj (kiel la lasta konkurso de EPĈ-amikoj), iam pli malgrandaj, iam — simple enigmoj kaj krucvortoj. Tio pliintimigos la ligan inter la Redakcio kaj legantaro, kaj inter la legantoj mem.

V. JUROMSKI (Sovetunio)

La opinio estas utila. Ni volas daŭre organizi konkursojn, subtenate de niaj legantoj. Baldaŭ okazos malgrandaj konkursoj en la rubriko "Amuzoj".

La Red.


ENHAVO

- 6 **Yixing, urbo de fajencaĵoj**
- 10 FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:
Domkonstruado en ĉina kamparo
- 14 **Nova provo de la kamparanoj en la ĉirkaŭurbo de Pekino**
- 32 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (9):
En la hejmloko de orĉevalo kaj jadvoko
- 16 **Batalo kontraŭ korupto en Shenyang**
- 18 LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ E-ISTOJ:
Vojaĝimpresoj el Japanio
- 41 Ŝulda krizo de la disvolviĝantaj landoj
- 37 ĈINA LITERATURO:
"Peonia Kiosko" de Tang Xianzu kaj la operoj de la dinastioj Ming kaj Qing Songô
- 23 Moroj de la antikva tigro-kulturo de Guanzhong
- 26 AMUZOJ
- 43 La termofonta konvaleska hospitalo Xiaotangshan
- 52 SCENEJO KAJ EKRANO:
Chuntao
- 50 Sovetiaj baletistoj en Ĉinio

- 27 POEMO • KALIGRAFAĴO • PENTRAĴO:
Pri la poemo "Forlaso de Baidi en la mateno"
- 20 **Vizito al Golmud sur altebenaĵo**
- 49 POR KOMENCANTOJ:
Sinjoro Segemann
- 48 SUR NIA LIBROBRETO:
Rakontoj konataj de ĉiuj familioj en Ĉinio
- 45 ESP-NOVAĴOJ
- 30 KURANTAJ AFEROJ
- 31 Esp-kurso en la Pekina Radio-instituto
- 19 KORESPONDI DEZIRAS
- 4 INTER NI
- SUR LA KOVRILO:
Metiisto Li Shoucai faras argilan vazon kun desegno de drako kaj fenikso.
Foto de LIU SIGONG
- 2 Pentrado sur Tian'anmen-placo
En la lasta somero sur Tian'anmen-placo estis interesa pentrado. 400 infanoj dividitaj en 40 grupoj faris 40 akvarelojn kun la temo "Mia Patrolando" sur papero kun totala longo de 400 metroj. Per tio ili esprimis sian amon al la patrolando kaj paco kaj sopiris al la bela estonteco.
Foto de GAO GUANGDE
- 4 Neĝo
Foto de HAN LIU
- 46 Fotografiaj verkoj
SUR LA DORSKOVRILLO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Norda rivero de birdflugo
de ALEKSANDR KOVALJOV (USSR)

LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO


1. Shenyang
2. Golmud
3. Yixing-gubernio
4. Huaxian-gubernio
5. Huzhou
6. Cangzhou



Yixing, urbo de fajencaĵoj

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de LIU SIGONG



En produktejo de tekruĉoj el purpura argilo

Bazaro de fajencaĵoj




Tekruĉoj el purpura argilo





Fajencaĵoj transportataj aliloken

En bakejo de fajencaĵoj





Gu Jingzhou

LA urbeto Dingshu estas verlando de fajencaĵoj. Tie troviĝas belega eksponejo dekorita sole per fajencaĵoj kaj sesangula kiosko kun fajencaj kolonoj ĉirkaŭitaj de flugantaj drakoj, fajencaj firstoj en figuro de drako kaj glazuritaj tegoloj. Eĉ balustradoj de iuj pontoj kaj sokloj de stratlampoj estas fajencaj.

En Ĉinio se oni mencias fajencaĵojn, oni nature ekzempligas Yixing, negrandan gubernion ĉe la suda limo de Jiangsu-provinco, kaj la plej tipa kaj plej fama en produktado de fajencaĵoj estas urbeto Dingshu, 10 km sude de la guberniurbo. La loĝantaro negranda, sed la produktado de fajencaĵoj komenciĝis antaŭ 2400 jaroj. Tie estas 130 vendejoj de fajencaĵoj, kaj ĉ. 20000 homoj okupiĝas pri ceramiko. Tiuj vendejoj estas merkato konkurencata de la fajencaj fabrikoj por siaj produktaĵoj. Por altiri klientojn oni pendigas la plej novajn produktojn ĉe la pordego, kiuj rebrilas en vesperruĝo. Ĉu la ceramikaj homoj antikvaj kaj nuntempaj, birdoj kaj bestoj gravuritaj, ĉu la ĉiutagaj fajencaj bezonaĵoj kun pentraĵoj de pejzaĝoj, floroj, birdoj, insektoj kaj fiŝoj, ĉiuj konkuras inter si pri beleco kaj oni ne tediĝas eĉ centfoje rigardante ilin.

La specoj de fajencaĵoj de Yixing estas tre diversaj. Vizitante kelkajn fajencajn fabrikojn kaj butikojn, mi komprenis, kial la lokanoj nomas la fajencaĵojn el purpura argilo, la jun-fajencaĵojn, la fajnan fajencaĵojn, la celadonverdajn porcelanaĵojn kaj la desegnan fajencaĵojn “kvin oraj floroj” kaj rigardas ilin plej bonaj reprezentantoj de fajencaĵoj.

ORIGINALA UZO DE FAJENCAĴOJ EL PURPURA ARGILO

En fabriko de tiaspecaj fajencaĵoj mi unuafoje vidis, kiel metiistoj faras el purpura argilo diversformajn kruĉojn, tasojn, botelojn, vazojn, tripiedajn ujojn, luksaĵetojn por legoĉambro, miniaturajn rokaĵojn kaj homfigurojn. Fajencaĵo kun poemo, bildo kaj stampo de la aŭtoro estas rigardata kiel sukcesa verko. Fajencaĵo el purpura argilo en koloro de fero, kun gravuritaj kaligrafiaĵoj kaj bildo estas perfekta artaĵo.

Purpura argilo estas naturdotita riĉaĵo de Yixing. Ĝi dividiĝas en tri specojn. En malsama temperaturo de bakado la produktoj ricevas malsamajn kolorojn kupran, kaŝtanan, cinabroflavan, inknigran, brunni-

gran kaj aliajn.

Pri eltrovo de la purpura argilo mi aŭskultis interesan rakonton: En la antikveco iu bonzo subite senĉese kriis: “Vendu riĉigan teron, vendu riĉigan teron!” La vilaĝanoj opiniis, ke li estas frenezulo. Post kelke da tagoj la bonzo kondukis kelkajn maljunajn vilaĝanojn al proksima kaverno kaj montris al ili: “Riĉeco kuŝas en ĝi, vi mem akiru.” La vilaĝanoj ekfosis kaj trovis diverskolorajn argilojn. Ekde tiam la lokanoj nomas tiun teron “riĉiga tero” kaj komencis fari el ĝi tekruĉojn.

La tekruĉo el tia argilo estas la plej delikata verko inter tiaspecaj fajencaĵoj. Ĝi havas multajn kvalitojn: Teo en tia fajencaĵo ne perdas sian originalajn guston kaj koloron. Ju pli malnova estas la kruĉo, des pli bonodora estas la teo. La purpura argilo malbone kondukas varmon, tial ĝi ne brulas al la mano de trinkanto. Pro tio fajencaj tekruĉoj malgrandaj estas rigardataj kiel trezoroj.

72-jara Gu Jingzhou estas artmetiisto de fajencaĵoj el purpura argilo. En la aĝo de 17 jaroj li ekokupiĝis pri farado de kruĉo. Li havas altan teknikon tiuflanke. Li ofte donis al kruĉoj formon de pino, bambuo, umeo kaj variaj geometriaj



En farejo de fajencaĵoj kun desegnoj

figuroj. Liaj verkoj antikvecaj kaj delikataj estas alte taksataj en- kaj eksterlande.

FAJNAJ FAJENCAĴOJ DUONPORCELANAJ

En la eksponejo de la Yixing-a Fabriko de Fajnaj Fajencaĵoj, la produktaĵoj frapis miajn okulojn. Inter ili la plej altira estas kompleta servo farita imite al tiu uzita en imperiestra palaco, mendita de restoracio en la Somera Palaco en Pekino. Ĝi konsistas el 9 krizantemformaj teleroj kiel la ĉefaj, kaj la akcesoraj teleroj, fiŝpladoj, kalabasformaj vinkruĉoj, incensujoj k.a. Ĝi eksponiĝas ankaŭ aliaj pli ol 20 pecoj de fajenca servo en figuro de fiŝo, testudo, krabo, karmo kaj pavo, fajencaj subtasoj en formo de brasko, persiko, mandarino, pomo, lotusa frukto k.a.

Oktobre de 1988, la angla reĝino Elizabeta la Dua vizitis Ŝanhajon. Dum manĝado ŝi alte taksis tiaspecan servicon, ke ŝi ne vidis tian figurigitan fajncan servicon, kvankam ŝi vizitis multajn landojn. Ĉe forlaso de nia lando ŝi ricevis tian servicon kiel donacaĵon.

Estro de la fabriko konigis al mi,

ke la fajna fajenco de Yixing estas delikata kiel porcelano kaj firma kiel ceramiko. Oni sukcesis fari tian fajncan en 1963, kaj la sekvan jaron tia fajenco aperis sur la internacia merkato kaj vendiĝas en pli ol 40 landoj kaj regionoj. Nun la fabriko produktas 600 specojn da fajencaĵoj, kiaj servo, drinkilaro, kafotrinkilaro, florcavo, murtelero kaj skribilaro.

Mi intervjuis junan teknikiston de la fabriko Zhuge Yixian. Li projektis rektangulan skribilaron, uzante argilterojn gagatnigran, glaŭkan, indigan, angilhaŭtkoloran k.a. Li lertas kopii poemojn kaj bildojn de famuloj sur la skribilaron. Tia artmetiaĵo eleganta estas multe ŝatata.

GRANDA PEJZAĜO EL DIKFINGRO

Jun-fajenco de Yixing estas nomata de japanoj "holoturia ujo". Vizitante la Artmetiaĵan Fabrikon de Jun-fajenco de Yixing, mi eksciis, ke por jun-fajenco la plej grava estas glazuro. Ĝi prenas puncan, indigan kaj purpuran kolorojn kiel siajn bazajn kolorojn. Rigardate de malproksime, ĝi estas malhele blua,

kvazaŭ blanka nubo reflektanta en profunda lago. Rigardate de proksime, maldensaj blankaj punktoj brilas en la malhela blua, kvazaŭ steloj en nokto. La fabriko produktas tre diversajn produktaĵojn, ekzemple drakovazego, fajropoto, antikvastilaj tripiedo, incensujo kaj kraĉujo, fajencaj tablo kaj seĝo, florcavo. Ĉiuj produktaĵoj portas originalan nacian stilon.

En laborejo de eksportaĵoj mi vidis, kiel metiistoj laboras per dikfingro. La metiistoj unue formis bildojn el diverskoloraj argiloj kaj poste iom rafinis ilin per bambupeco.

Iu junulo estis zorgeme rafinanta drakan kapon sur vazego. Li laboris sufiĉe lerte, senĉese movante sian dikfingron. Laborante li respondis miajn demandojn. Li nomiĝas Li Shoucai, 35-jara, okupiĝis pri tiu laboro jam 18 jarojn. Li estas diligenta kaj lernema, lertas en skizado kaj gravurado. Ekde 1986 li okupiĝis sole pri projektado, desegnado, modeligo kaj pogranda produktado de altkvalitaj eksportaĵoj. En 1987 iu arta kompanio de Hongkong invitis lin fari demonstradon pri la tekniko. La sceno de lia dikfingro longe restis sur la ekrano. Ĉu tio ne atentigas pri la grava rolo de la dikfingro en farado de jun-fajenco?

"ORIENTA SAFIRO"

En gastigado la ĉinoj ŝatas uzi siajn plej bonajn servicojn. Ilin produktas ne nur Jingdezhen de Jiangxi, Liling de Hunan kaj Zhibo de Shandong, sed ankaŭ Yixing. En 1981 la celadonverda porcelano de Yixing unuafoje vendiĝis en Usono, kaj oni honore nomis la celadonverdan porcelanon "orienta safiro".

Mi tre admiras la belecon de la celadonverda porcelano rebrilanta kiel jado. Mi plej ŝatas la glaŭkan koloron. Mi informiĝis, ke oni ne nur heredis la tradiciajn teknicojn, sed ankaŭ kreis novajn metodojn. Por ĉiuj specoj de la produktaĵoj estas majstraĵoj. Ekz. la celadonverda porcelanaĵo en formo de krabo kaj naso. La krabo sur naso aŭdace svingas la pinĉilojn. Vere estas plezuro, se oni havas kelke da tiaj luksaĵetoj sur sia tablo. ■

FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO

Domkonstruado en ĉina kamparo

Teksto de HUA GUOWEI


Fotoj de LIU SIGONG

Novaj domoj de kamparanoj



Tie aperos nova domo.





Sur balkono de nova domo

En nova kamparana domo

Foto de RU SUICHU



Nove konstruitaj domoj



ĈE la bordoj de la Granda Kanalo inter Pekino kaj Hangzhou (Hangĝoŭ) ĉiutage aperas novaj domoj. Laŭ statistiko en 1978, kiam Ĉinio ekpraktikis la politikon de reformado kaj pordmalfermo, en la baseno de la kanalo pli ol 40 milionoj da kamparanaj familioj malkonstruis sian malnovan domon kaj starigis belan kaj helan novan loĝejon. Havigi al si novan kontentigan domon jam fariĝis komuna deziro de la kamparanoj de la baseno.

Raporto el la urbo Huzhou (Huĝoŭ) de Zhejiang (Ĝeĝjang)-provinco, ĉe la suda fino de la kanalo, diras, ke ambaŭborde de la kanaloparto 95% de la kamparanoj nun loĝas en novaj domoj kaj tie ĉiu loĝanto meznombro havas 27 kvadratajn metrojn da loĝ-areo. En la 4 jaroj de 1984 ĝis 1987 la tieaj kamparanoj konstruis domojn kun totala areo de 15 milionoj da kvadrataj metroj kaj ĉiu familio meznombro kun 30.35 kvadrataj metroj.

Shen Zengfu, kamparano de la antaŭurbo de Huzhou, en 1986 investis 40 mil juanojn kaj konstruis 2-etaĝan domon el 8 ĉambroj. Antaŭe lia 8-membra familio loĝis en malalta kabano. En 1983 li kune kun siaj du fratoj ekfunkciigis fabrikon de vestoj, kiu produktas 10 specojn da vestoj. Ilia jara pokapa

enspezo estis pli ol 20 000 juanoj.

En la nova domo de Shen Zengfu oni apenaŭ kredas, ke oni estas en ĉina kamparo. Tie estas mozaika planko el brikoj, brilas en la sunlumo la vitroj de longaj fenestroj kaj prosperas la floroj en la ĝardeneto.

“Antaŭ 10 jaroj mia familio estis la plej malriĉa en la vilaĝo,” diris Shen.

Atinginte la Nordĉinian Ebenajon, la kanalo estas preskaŭ elĉerpita. La tieaj kamparanoj malriĉaj loĝis generacion post generacio en mallumaj kaj malsekaj kabanoj. Tamen la amasa entuziasmo por malkonstrui malnovajn domojn kaj konstrui la novajn infektis ankaŭ tiun regionon. Oriente de la sekiĝinta kanaloparto ĉe Cangzhou (Cangĝoŭ) la 51-jara kamparano Shi Jinxing (Ŝi Ĝinŝing) elspezis 25 mil juanojn akumulitajn de li dumlonge kaj konstruis 6-ĉambran domon tegmentitan per tegoloj en la pasinta jaro. Tamen kompare kun tiuj de liaj samvilaĝanoj, lia estas neniom pli bona. Shi diris al mi, ke en lia hejmvilaĝo Majiapu (Maĝjapu) ĉiuj familioj havigis al si novan domon.

En la pasintaj 10 jaroj, dank’ al la politiko de reformado praktikata de la ĉina registaro, senpreced-

ence disvolviĝis la agrikultura ekonomio. Oficistoj informis, ke kamparanoj en la baseno de la kanalo nun sin okupas pri diversaj laboroj tute fremdaj al ili antaŭ 10 jaroj. Nun 40% de la tieaj terkulturistoj laboras en vilaĝaj industriaj entreprenoj kaj ilia enspezo 10-obliĝis. Kaj la furoro pri domkonstruado estiĝis ĝuste en tia situacio.


Kompreneble ne ĉiuj kamparanoj havas sufiĉe da mono por konstrui domojn. En la 4 provincoj kaj 2 municipoj, precipe en la agrikulturaj regionoj norde de Yangzrivero, oni havis grandan malfacilon de domkonstruado. En Yutai-gubernio de Shandong-provinco loĝantoj de multaj vilaĝoj devas prunti monon de siaj samvilaĝanoj por la konstruado kaj la prunteprenantoj devas doni en la sekvanta jaro ĉiujn siajn enspezojn al aliaj domkonstruantoj.

Kvankam tio estas maloportuna, tamen en la okuloj de la nuntempaj kamparanoj nenio estas pli grava ol domkonstruado. Oni sentas sin korpemata, kiam oni vidas, ke alta domo staras tuj apud lia malalta kabano. Iuj eĉ opinias, ke kiu malhavas novan domon, tiu estas sentaŭgulo. Pro tiu publika opinio oni ĉiam solenas la finkonstruiĝon de novaj domoj. Tiam najbaroj, amikoj kaj parencoj gratulas la mastrojn portante donacojn kaj eksplodigas petardojn, dum la mastroj faras festenon por la gratulantoj.

Ĉinio estas lando kun 1.1 miliardoj da loĝantoj, sekve de tio ili havas multe da malfaciloj en loĝado. Statistiko montras, ke la ĉinaj urbanoj meznombro havas malpli ol 7 kvadratajn metrojn da loĝ-areo. La lokaj registaroj de Ĉinio nun klopodas por ŝanĝi tiun fenomenon kun la celo, ke antaŭ la fino de la 20-a jarcento la pokapa loĝ-areo en la ĉinaj urboj atingu 8 kvadratajn metrojn. En la vasta kamparo, kaŭze de la apero de novaj domoj, pli kaj pli malpliĝas agroj. En la lastaj jaroj la registaro limigis la kamparanojn je domkon-

En korto de kamparana familio





Novaj domoj ĉe kampo

strua areo, pro kio la novaj domoj en la vilaĝoj fariĝis pli kaj pli altaj.

En la vasta kamparo sude de Yangzi-rivero ĉie vidiĝas 2- kaj 3-etaĝaj domoj. Iuj el ili estas ekipitaj per radiatoro kaj provizitaj per kranakvo. La domoj estas meblitaj lukse. Laŭ statistiko farita de la urbeto Tongqiao (Tongĉjaŭ) de Wuxian (Uŝjan)-gubernio, Jiangsu (Ĝjangsu)-provinco, tie en la pasinta jaro 400 familioj konstruis etaĝdomojn per 11 milionoj da juanoj. Tie nun aperis 4-etaĝaj domoj. La supraj etaĝoj servas kiel loĝejo, dum la teretaĝo kiel butikoj aŭ metiejo.

Dum longaj jaroj ĉinaj kamparanoj vivis modeste kaj eĉ malriĉe. Por sin vivteni, ili diligente laboris sur kampoj, tamen ĉiam mankis al ili sufiĉe da mono por konstrui novajn domojn. Nun la longdaŭra entuziasmo por domkonstruado en la kamparo fariĝis problemo ofte diskutata de fakuloj pri kamparo kaj ĉagrenis ilin, ĉar kun la apero de pli kaj pli multaj novaj domoj oni ĉiam reduktis sian investon al la agrara fundamenta konstruado. Tio certe malbone influos la agrikulturan produktadon. Sed pli da homoj opinias, ke la entuziasmo por domkonstruado en la baseno de la kanalo aperinta sub certaj ekonomiaj kondiĉoj estas kaŭzita de komplikaj faktoroj, inkl. de la

tradiciaj konceptoj pri riĉaĵoj, geedziĝo k.a.

La maltrankvilo kaŭzita de la prez-reformado de Ĉinio en la lastaj jaroj komprenigis al la kamparanoj, ke domkonstruado eble estas taŭga metodo por konservi la valoron de mono. Ili deziras per domkonstruado turni sian kapitalon en gravan nemoveblan havaĵon. Wang Fengrui (Ŭang Fengĵuj), kamparano de Cangzhou (Cangĝoŭ), Hebei-provinco, konstruos 4-ĉambran tegoldomon en la kuranta jaro. Montrante amason da tegoloj, brikoj, cemento kaj ligno ĉe la vojo, li diris: "Ilia prezo altiĝas. Ni konstruos domon, kio signifas plivalorigi monon."

En la ĉina kamparo la novaj domoj reprezentas la riĉaĵon, socian pozicion kaj estontecon de la kamparanoj. Ili havas striktan rilaton kun la geedziĝo de la kamparanoj. En la lastaj 10 jaroj ĉiuj novedzinoj enloĝiĝis en nove konstruitaj domoj. En la okuloj de la tieaj kamparanoj la edziĝo strikte ligiĝas kun novaj domoj. Sen nova domo junaj kamparanoj tre malfacile trovas amatinon. Eble ĝuste pro tio Cha Achun, kamparano de Wujiang (Uĝjang)-gubernio en orienta Ĉinio, estas multe respektata de la tieaj fraŭloj.


Antaŭ 6 jaroj la 10-membra

familio de Cha Achun loĝis en kabano el 4 ĉambroj. Liaj 4 plenkreskaj filoj neniel povis gajni la koron de proksimaj knabinoj. En 1983 laŭ kontrakto la honesta Cha Achun ekrespondicis pri 6 hektaroj da akvosurfaco. Li kaj aliaj 5 familioj, kiuj loĝis tiutempe en pajlaj kabanaj, starigis fiŝbredan kombinaton kaj post 3 jaroj ili ĉiuj enloĝiĝis en novaj domoj kun tegola tegmento.

Post unu jaro la 55-jara Cha Achun kun aliaj 23 familioj, loĝantaj en pajlaj kabanaj, organizis la duan kombinaton. Li diris al fraŭloj, al kiuj mankis mono por domkonstruado, ke ili ĉiuj enloĝiĝos en novaj etaĝdomoj post 3 jaroj. Ĝis majo 1988, 19 el la 23 familioj enloĝiĝis en etaĝdomoj. La 4 filoj de Cha Achun jam edziĝis kaj kompreneble la novgeedzoj pasigis sian unuan mielan nokton en novaj domoj.

Parolante pri Cha Achun, Chen Asi ne povis sin deteni de emociigo pro danko al li, ĉar dum la 10 jaroj antaŭ lia aliĝo al la kombinato neniu knabino vizitis lin en lia kabano, sed marte de 1987, kiam li konstruis por si 5-ĉambran etaĝdomon, la afero subite ŝanĝiĝis kaj li adiaŭis la fraŭlan vivon kaj ekhavis sian feliĉan familion. ■

Nova provo de la kamparanoj en la ĉirkaŭurbo de Pekino



Porkoj bredataj laŭkontrakte

LONGWANTUN-subgubernio de Shunyi-gubernio en la orienta ĉirkaŭurbo de Pekino situas sude de Yanshan-montaro. Rigardate de malproksime vidiĝas unuflanke ondantaj montoj, aliflanke ebena kamparo punktita de vilaĝoj, kun interkruciĝaj vojetoj.

La 13 vilaĝoj de Longwantun havas 15 kolektivajn kultivejojn.

Aŭte veturante antaŭen laŭ montpieda vojo, ni vidis Xiaobaiwu-vilaĝon ombratan de arboj. Sub vico da popoloj mi renkontis Ma Hai, estron de la kultivejo de la nomita vilaĝo, kiu kamplaboris pli ol 20 jarojn. Li invitis min al sia hejmo kiel konaton. Lia domo sidis inter verdaj arboj. Bonorda ĉirkaŭmuro ĉirkaŭis liajn du kortojn. La ekstera korto estis pli vasta kaj kvieta. Tie kelkaj kokoj kaj anasoj libere serĉis manĝaĵojn sub popoloj. En la interna korto estis komfortaj dormoĉambroj. Antaŭ la pordo estis amaso da ĵus rikoltitaj maizspikoj.

Post kiam mi eniris lian ĉambron, la gastama Ma Hai prezentis al mi teon kaj cigaredon. Poste li konigis al mi sian pasintan vivon de kamplaboro kaj ŝanĝiĝon de la strukturo de agrikulturaj produktado kaj entreprenado en la pasintaj 40 jaroj.

Li diris, ke en la komenco de la kvindekaj jaroj, la kampoj apartenis al la kamparanoj. Ĉiu familio kulturis sian parcelon kaj rikoltis la frukton, la kamparanoj havis produktan aktivecon. Sed tia etkampana ekonomio ne povis elteni baton de plago kaj grava malfacilo, la plagitaj kamparanoj malriĉiĝis facile. Kaj tio kaŭzis al la kamparanoj grandan diferencon de malriĉeco kaj riĉeco kaj socian tragedion.

En la meza periodo de la kvindekaj jaroj organiziĝis la kamparanoj kaj fondiĝis agrikulturaj produktaj kooperativoj. Poste ili disvolviĝis en popolajn komunumojn kaj la agroj apartenis al la kolektivo. La kamparanoj kamplaboris kaj enspezis laŭ sia laboro. Pro egalisma distribuado de la laboraj fruktoj la produktado ne povis disvolviĝi antaŭen kaj la kamparanoj ne povis plibonigi sian vivon.

Je la diro silento regis en la ĉambro. Ma Hai ekfumis kaj diris ridante: "En la komenco de la okdekaj jaroj, oni faris reformon en la kamparo kaj praktikis respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado. La agroj de nia vilaĝo disdoniĝis al la kamparanoj laŭkape. Ili povis kulturi la ricevitajn terojn libere kaj posedi la rikoltaĵojn. Tia entreprenada formo siatempe stimulis aktivecon de la kamparanoj."

"Kiel ĝi statis poste?" mi demandis.

Ma Hai diris kapneante, ke poste aperis novaj problemoj. Tia respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado ankoraŭ estis entreprenado sur parceloj, ĝi ne taŭgis por uzo de agrikulturaj maŝinoj kaj ne vidiĝis skalan efikon de la moderna agrikulturo. Krome, iuj kamparanoj ne estis lertaj en kamplaboro; aliaj forlasis la kamplaboron por okupiĝi pri komercado; triaj ne volis aĉeti kemisterkon, tiel ke la agroj steriliĝis jaron post jaro. Ĉio ĉi tio kaŭzis al la agrikulturo malprosperiĝon, al la agroj malmultan produkton, ke la kamparanoj ne povis liveri al la ŝtato pli multan grenon.

Ma Hai diris, ke por solvi la supre menciitajn problemojn, ilia subgubernio aplikis novan entreprenadan formon, nome entreprenadon de konvena skalo. Ma Hai diris: "Nun ne ĉiuj kamparanoj okupiĝas pri kamplaboro. Granda kvanto da kampoj estis laŭkontrakte donita al malmultaj kamparanoj, kiuj kapablas en kamplaboro. Unu familio povas laŭkontrakte kulturi 1-3 hektarojn da agroj, kio havigas al la kontraktanto pli grandan entreprenadan skalon kaj pretigas kondiĉojn por maŝina terkulturo. Sed tiu skalo estas limigita, ĉiu kontraktanto ne povas kulturi pli



Rikolto de maizo

multe da kampoj pro la malmultaj kampoj, tial oni nomas tian formon entreprenado de konvena skalo.”

Por konduki la entreprenadon de konvena skalo, Longwantun fondis agrikulturan kompanion. Ĝia unua tasko estas aĉeti semon, kemisterkon, insekticidon, agrikulturajn maŝinojn k.a. por la kultivejoj, kaj ĝia alia tasko estas direkti la produktadon de la kultivejoj, fari kulturajn planojn kaj prezenti kulturajn postulojn. La agrikultura kompanio estas direkta kaj ankaŭ serva organizo.

La kultivejoj estas rekte sub la gvido de la propra vilaĝa komitato, kiu administras gravajn aferojn de la vilaĝo, inkluzive gvidon de la entreprenoj, kultivejoj kaj kromokupa produktado k.a., kaj parta profito akirita de la entreprenoj, kultivejoj kaj kromokupa produktado apartenas al la vilaĝa kaso.

Xiaobaiwu-vilaĝo estas malgranda montvilaĝo kun 70 familioj kaj ĉ. 40 hektaroj da agroj. Post praktiko de la entreprenado de konvena skalo, nur pli ol 20 kamparanaj familioj laŭkontrakte kulturis la kampojn. La aliaj laborfortoj okupiĝis pri aliaj aferoj. La vilaĝo fondis konstruan trupon por laŭkontrakte fari konstruadon ekster la vilaĝo. Ĝi ĉiujare havigas al la vilaĝo pli ol 100 000 juanojn. Ma Hai konigis al mi, ke por praktiki la entreprenadon de konvena skalo, en la lastaj jaroj la vilaĝo aĉetis per pruntita banka monsumo traktoron, semmaŝinon, rikoltan maŝinon, disgraĵnigilon, aŭton kaj ekipaĵojn de

ŝpruca irigacio. Post 3 jaroj ĝi jam kvitiĝis kaj la kolektiva ekonomio disvolviĝis jaron post jaro.

Post praktiko de la entreprenado de konvena skalo, la kultivejoj aranĝas sian produktan planon laŭ la bezono de la ŝtato kaj la dispozicio de la agrikultura kompanio. La kultivejoj plenumas maŝinajn plugon, semadon rikolton, ŝprucan irigacion, sterkadon kaj insekticid-ŝprucigon sur la kampoj de la kontraktantoj. La kontraktantoj zorgas nur flegadon al la plantoj, tial ilia laboro estas ne tre peniga kiel antaŭe.

Mi demandis Ma Hai: “En kia formo oni rekompencas la kamparanojn, kiuj laŭkontrakte kulturis grandareajn agroj?” Li respondis: “Monbiletoj kaj objektoj.”

En ĉiujara kontraktado de interkonsento pri agroj kun la kultivejoj, iuj kontraktantoj ne pagas monon kaj ne donas investon al la agroj. Kaj la kultivejoj senpage plugas por ili, liveras al ili semon, kemisterkon, insekticidon k.a. La greno produktita de ili apartenas al la kultivejoj. Laŭ ilia produktokvanto de greno la kultivejoj pagas al ili certan salajron. Se la kontraktantoj superplenumis la produktokvanton de greno, la kultivejoj premiis ilin per duono de la superproduktita greno por stimuli ilian produktan aktivecon.

En subskribo de la kontrakto pri la agroj aliaj kontraktantoj devas doni pagon pri la agroj al la kultivejoj kiel ilian publikan akumulon. Samtempe ili devas doni produktan

pagon al la kultivejoj por aĉeti semon, kemisterkon kaj insekticidon. La plugado, semado, rikoltado kaj irigaciado de la kultivejoj postulas de ili pagon. La produktita greno apartenas al ili mem, sed 1/3 el la greno devas esti vendata al la ŝtato laŭ la ŝtataj prezoj, la ceterajn ili povas disponi libere. La rikoltita greno estas donita de la kultivejoj kiel salajro.

Mi vizitis Li He, kiu laŭkontrakte kulturis tri hektarojn da agroj. Li unujare pagis al la kultivejo 2 000 juanojn por la agroj kaj 6 300 juanojn por la agra investo kaj maŝina uzado. En la jarfino, li nete enspezis 19 000 juanojn. Por kulturi la agroj li uzis nur 200 labortagojn en unu jaro. Ordinare, nur li kaj lia edzino flegas la kampojn, en laborplena sezono ili dungis kelkajn helpantojn. Krom la terkulturado, li ankaŭ bredas 6 000 kokojn, kio nete havigis al li 18 000 juanojn unujare. Li ĉiujare liveras al la ŝtato pli ol 30 000 kilogramojn da grenoj. Neniu ĉina kamparano povis fari tian kontribuon antaŭ la reformo de la ĉina kamparo!

La entreprenado de konvena skalo ŝanĝis la fizionomion de Longwantun, kie la kamparanoj antaŭe prenis batatojn kiel ĉefan manĝaĵon. Hodiaŭ ĉiuj familioj havas superfluaĵajn grenon kaj monon kaj suriris komune riĉigan vojon.

Kompreneble, tia entreprenado estas nur nova provado de la kamparanoj ĉirkaŭ Pekino, ĝi havas neprojektan flankon kaj devas esti esplorata, ĉu ĝi estas taŭga por aliaj lokoj. ■

BATALO KONTRAŬ KORUPTO EN SHENYANG

“Juĝu lin! Juĝu lin tuj!” koleris maljunulo kun okulvitroj, svingante la manon. Junulo sidanta kontraŭ la maljunulo rigardis lin milde kaj kvietigis lin, kaj ĉi tiu komencis denunci la direktoron de la hotelo Dongfeng pri lia ekonomia problemo. Tion mi propraokule vidis en la denunca centro de la Shenyang-a Prokurorejo.

De post 1988 la diversnivelaj instancoj disciplin-inspektaj, prokuroraj kaj kontrolaj de Shenyang serioze praktikis la disciplinon - kaj leĝon, traktis ĉiaspecajn kazojn kontraŭdisciplinajn kaj kontraŭleĝajn, precipe ekonomiajn, kaj faris multe da laboroj por kondamni korupton, kuraĝigi honeston kaj forigi malversacion. Ĝis la fino de la lasta junio, la disciplin-inspektaj instancoj de la urbo traktis sume 1 072 kazojn kaj finis 872 el ili. 313 partiaj funkciuloj estis punitaj kadre de la partia organizo; la prokuroraj instancoj de la urbo traktis 247 kazojn kaj finis 175 el ili; kaj la kontrolaj instancoj de la urbo traktis 167 kazojn, inkl. 50 gravajn kazojn, kaj finis 127 el ili. Tio rebonigis la partian disciplinon, batis ekonomiajn krimagojn, eliminis koruptitojn kaj akcelis la praktikadon de honesta politiko.

El la supre menciitaj kazoj la plej surpriza estas la serioza korupto far direktoro Yang Renlong (Jang Ĵenlong) de la Shenyang-a privata kunlabora restoracio Dongfang kaj lia frato Yang Renjie (Jang Ĵenĝje). Estas koruptitaj de ili pli ol 30 partiaj kaj registaraj funkciuloj, inter kiuj dekkelkaj estas de nivelo buroa aŭ subburoa. Kaj la sumo de ilia ŝmirmono atingis 160 000 juanojn.

Zhang Yingbo (Ĝang Jingbo),

konstanta membro de la Partia Komitato de la distrikto Shenhe de la urbo kaj estro de ĝia propaganda departemento, kaj aliaj ĉiamaniere favoris al la fratoj Yang la kontraŭleĝan rekonstruadon de la restoracio, utiligante sian povon. Rezulte de tio, la fratoj kredite ricevis milionojn da juanoj kaj centmilojn da juanoj por sekurigo, el kiuj Yang Renlong alproprigis kaj fordiboĉis pli ol 0.95 milionon da juanoj. Por danki Zhang Yingbo, la fratoj donacis al li videoaparaton, fridujon, orajn ringojn kaj 4 000 juanojn kaj dekoraciis liajn du loĝejojn. Zhang ricevis 10 000 juanojn da koruptaĵo. Ankaŭ iuj aliaj funkciuloj estis koruptitaj de la fratoj. Nun Zhang kaj aliaj 5 partiaj funkciuloj estis senigitaj je la partianeco kaj 4 el ili arestitaj.

Samtempe kun tio, la kontrolo pri komercado kaj funkciigado de entreprenoj far funkciuloj de partiaj kaj registaraj institucioj de la urbo malesperigis multajn loĝantojn, kiuj deziris, ke oni malkaŝu ŝakradon de altranguloj, sed vane. Oni kontrolis 4 oficialajn kompaniojn, kontraŭ kiuj la loĝantoj ege malkontentas, sed oni konstatis nur 137 000 juanojn akiritajn de ili per neleĝa komercado. En la tuta urbo oni konstatis post kontrolo nur 10 000 juanojn, kiujn ricevis 21 kumulantoj kiel neleĝan rekompencan kaj redonis al koncernaj instancoj. La loĝantoj dubis pri la ĝisfunda kontrolo. Por bone scii la aferon, mi intervjuis s-ron Zhao Zhiqiang (Ĝaŭ Ĝiĉjang), estron de la Shenyang-a Prokurorejo.

Zhao montris, ke oni serioze reordigas oficialajn kompaniojn. Li dir-

is, ke la supre menciita monsumo ne inkluzivas tiun de la granda energio-grupo Guandong. La kontrolo pri la grupo ankoraŭ ne finiĝis. La aliaj 3 kompanioj, li daŭrigis, ne estas grandaj kaj funkcias ne longe post sia fondiĝo. Ekz-e, oni komencis kontroli la industriajn kompanion Dakang nur 4 monatojn post ties fondiĝo, sed la kontrolo daŭris 10 monatojn. Nun la industria kompanio Songlin, unu el la 3 kompanioj, estas nuligita, kaj la industriaj kompanioj Dakang kaj Yingyun jam rompjis rilatojn kun la registaro. S-ro Zhao konfesis, ke kondamni korupton estas ekstreme malfacile.

La Imposta Buroo estas rigardata kiel la plej granda ĉantaĝa institucio. En la pasinta jaro nur 14 personoj estis punitaj pro koruptiĝo aŭ malversacio. Ili konsistigas malpli ol 0.4% de la 4 000 laborantoj de la buroo. Oni povas diri, ke ĝi estas honesta institucio. La 56-jara Zhang Pu (Ĝang Pu), estro de la prokurorejo sub la buroo, diris malkaŝe: “Mi konfesas, ke la punitaj personoj konsistigas nur malgrandan parton de la laborantoj. Tamen ni serioze kontrolis tion, kion denunciis la popolo. Kaj ni donas severan punon al tiu, kies koruptiĝo estas jam konstatita. Iu impostisto, pro malversacio de 2 000 juanoj, estis kondamnita al 1.5-jara mallibereco. En la pasinta jaro ni punis 7 laborantojn, kio estis senprecedenca en nia buroo.”

Estas same por departementoj de industrio kaj komerco, publika sekureco kaj prezo-administrado. Ili alprenis multajn rimedojn por bati ĉantaĝon, korupton k.a. Sed kial oni ankoraŭ ne kontentas pri kondamno

de korupto?

Unue, estas malfacile malkaŝi la aferon. Respondeculo de la Shenyang-a Buroo de Publika Sekureco diris: "Estas multe da onidiroj, ke ĉantaĝas policianoj pri trafiko kaj tiuj pri loĝantaraj aferoj. En la pasinta jaro en nia buroo kun ĉ. 10 000 homoj estis denuncitaj nur 5 kazoj tuŝantaj pli ol 500 juanojn eltorditajn. Kiel do kontroli kazojn ankoraŭ ne denuncitajn?"

Due, estas malfacile akiri ateston. Nun oni faras korupton ĝenerale sekrete. Eĉ denuncita, la ĉantaĝito ne volas doni ateston, ĉar li estas jam multe favorita. La Imposta Buroo sendis enketi pri impostisto, kiu faris turisman vojaĝon per ŝmirmono de iu fabriko. Ekster la atendo, la fabrikestro neis tion per falsa atesto.

Malgraŭ tio, Shenyang estas tre aktiva en la batalo kontraŭ korupto kaj akiris bonan rezulton. Mi prenu la denuncan centron de la urba prokurorejo kiel ekzemplon. La centro kun 11 laborantoj ekfunkciis septembre de 1988. Ĉiumonate ili akceptas 250, eĉ 300 denunciojn. Escepte de iuj kazoj prezentataj al disciplin-inspektaj kaj kontrolaj instancoj por ekzameni, la centro devas mem esplori ĉion kaj klarigi al la denuncantoj la rezulton de la traktado. Se ili ne kontentas pri la traktado, la centro devas ankoraŭfoje esplori la kazon. La centro celas egalecon, justecon, malkaŝemon kaj efikon. Ĝi invitis demokratojn labori kiel specialaj superrigardantoj. Ili estas ekspertoj pri kazo-traktado. Kun ili, la centro multe renomiĝis.

Kial aperis tiom multe da koruptoj? Fakuloj opinias, ke nun Ĉinio estas en la periodo de rapida ŝanĝiĝo de produktaja ekonomio al la vara. En tiu periodo la vara ekonomio ekhavas rudimentan formon, la malnova sistemo malkomponiĝas, pluraj ekonomiaj elementoj burĝonas, ekonomiaj kontaktoj diversas kaj enspezoj venas en pluraj kanaloj, tamen la organismo de socia imuneco ne estas starigita. Kun rapida levigo de la privata ekonomio, sufiĉe multaj homoj koruptas aŭ koruptiĝas por akiri profitegon. Kaj krome, ankaŭ la maljusta socia distribuado,



En la denunca centro

neperfekta leĝo, dutraka sistemo de prezaro kaj fenomeno "mono antaŭ ĉio", ĉiuj estas originoj de korupto.

Kiel meti finon al korupto fariĝis jam ĉefa problemo zorgata de la tuta socio. La koncernaj gvidaj departementoj de Shenyang faris paŝojn por venki korupton.

Plejparto de registaraj departementoj de la urbo havas sub si prokurorajn sekciojn. La urbo kaj ĝiaj gubernioj starigis denuncajn centrojn aŭ staciojn. La prokurora instanco de la urbo havas kompletan reton de administra kontroló.

La registara laboro estas malkaŝa en la urbo. 62 departementoj de la magistrato, kiuj multe kontaktiĝas kun entreprenoj kaj urbanoj, faras malkaŝan laboron, ke estas malfacile por iuj misuzi sian povon.

La magistrato reordigis 366 dokumentojn pri leĝo. Iuj estas abolitaj kaj aliaj reviziitaj por perfektigi.

Gvidantoj de la urbo diris, ke la paŝoj ne estas panaceo. Ili povas redukti korupton. Oni ne devas revigajni venkon en la batalo dum mallonga tempo, sed fari senlancan laboron por ĝin gajni.

La batalo kontraŭ korupto iras ne izolite. Lastatempe la ĉina registaro deklaris tuj fari sep aferojn zorgatajn de la popolo. Ili estas jene: Pluapaŝe reordigi kompaniojn, absolute malpermesi al la gefiloj de altranguloj fari komercadon, ser-

ioze trakti kazojn de malversacio, korupto kaj ŝakrado, precipe rapidigi traktadon de gravaj kazoj. Por tiu celo, la 15-an de aŭgusto 1989 la Supera Popola Kortumo kaj la Supera Popola Prokurorejo de la Ĉina Popola Respubliko publikigis "Anoncon pri sindenunco de malversaciuloj, koruptitoj kaj ŝakrantoj nepre en la difinita tempo". Ĉio ĉi sendube forte antaŭenpuŝos la batalon kontraŭ korupto ne nur en Shenyang, sed ankaŭ en la tuta lando.

Laŭ statistiko, de la 15-a de aŭgusto ĝis la 20-a de oktobro 1989, en Ĉinio 18 030 krimuloj sin denuncis sub la premo de la politikoj. Ili konfesis akiri 182.05 milionojn da juanoj per malversacio, korupto kaj ŝakrado kaj redonis 101.97 milionojn da juanoj, inkl. tiun monsumon, kiun valoras iliaj redonitaj, malhoneste akiritaj objektoj. Diversaj justicoj donis al la sindenuncantoj malseveran punon kaj severe punis la obstinajn krimulojn. Raporto diras, ke en la urbo Dalian oni arestis 68 ekonomiajn krimulojn, kiuj intencis kaŝi sian krimon, du horojn tuj post la limdato, la 31-a de oktobro 1989. Kompreneble, en la estonteco la pordo kiel kutime malfermiĝos al la ekonomiaj krimuloj, kiuj sin denuncos.

Oni esperas, ke la batalo kontraŭ korupto bone daŭros por krei la deziratan socian moron. ■



Vojaĝ- impresoj el Japanio

de SPOMENKA ŜTIMEC* (Jugoslavio)

La aŭtoro (maldekstre) en Japanio

DUM aŭgusto kaj septembro 1988 mi havis la okazon restadi en Japanio kaj tie aktivi por Esperanto. En majo 1987 mi estis invitita de Esperanto-Instituto ĉe la Universitato Dankook en Seulo labori por Esperanto en Respubliko de Koreio. Post dek sep jaroj da profesia laboro por Esperanto en Jugoslavio, kie mi laboras en Internacia Kultura Servo, renkontiĝo kun Esperanto-aktivecoj en Azio novmaniere riĉigis miajn spertojn.

Dum en Seulo mi ĉefe laboris kadre de Esperanto-Instituto kaj vespere gvidis Esperanto-kursojn en Korea Esperanto-Asocio, Japanio proponis al mi ĉefe vojaĝigan laborprogramon: mi vojaĝis tra preskaŭ 5 000 kilometroj de Japanio, prelegante kaj partoprenante en diversaj Esperanto-aranĝoj. En Nagoya mi partopren-

is Mondan Festivalon de Pupistoj, en Hiroŝima Mondan Kongreson kontraŭ Atomaj kaj Nukleaj Armitoj, alportante pacmesaĝon el Jugoslavio.

Sur la suda insulo Kyushy mi vizitis s-ron Mori Singo. Tiu vigla peranto de "El Popola Ĉinio" en Japanio por mia Esperanto-vivo havis gravan rolon: dum nia dudektri-jara korespondado li fariĝis mia "Esperanta onklo", kontribuinte ekde mia juna aĝo al mia interesiĝo por Esperanto, stimullinte min perfektigi en ĝi. Nia perletera amikeco apartenas al tiuj belaj transkontinentaj kontaktoj per Esperanto, kiaj abundas en pli ol centjara historio de la Internacia Lingvo.

Ĉe la plej granda japana lago Biwa mi instruis Esperanton dum la jubilea dudeka kunloĝado. En la

nordo de la lando, en Sapporo, mi partoprenis Japanan Esperanto-Kongreson kaj prelegis pri Jugoslavio kaj la zagreba metodo de Esperanto-instruado.

Kun afabla helpo de multaj esperantistoj, mi povis ankaŭ viziti la solan nejapanan popolon en Japanio — Ainu-popolon. Ilia tradicia popola literaturo Ainu-jukaro ekzistas ankaŭ en Esperanto-traduko.

De la japana nordo, mi ree direktis min al la plej granda insulo Honshu, prelegis kaj vizitis Esperanto-kursojn.

Tokio, la giganta urbo, estis mia hejmurbo dum septembro. Tie mi, kunlabore kun usonano Joel Brozowsky, por japana eldonejo Hakusuisya surbendigis kaseton por la nova Esperanto-lernolibro, eldonita ĉe la serio "Express" de tiu ĉi

lingvo-eldonejo. El Tokio mi vizitis multajn lokojn, kie esperantistoj aktivas. El ĉiuj plej multe impresis min la seriozeco de la poresperanta laboro en Jokohamo. La tiea Esperanto-rondo interalie eldonas ankaŭ interesan novaĵbultenon "Novaĵoj tamtamas".

Mian restadon en Japanio ebligis s-ino Kikuŝima Kazuko — Kri-zantemo, kiu dum multaj jaroj energie laboras por antaŭenigo de Esperanto ne nur en Japanio.

Dum preskaŭ 5 000-kilometra vojaĝo tra Japanio mi vizitis pli ol 30 esperantistajn familiojn.

Revene al mia lando, mi entre-

prenis serion da artikoloj kaj prelegoj, por peri al interesitoj iom el miaj renkontiĝoj dum la vojaĝo tra Japanio.

Komparante miajn impresojn el Japanio kun tiuj el Koreio el 1987, eblas konstati, ke azianoj nepre renkontas pli da malfacilaĵoj por ellerni Esperanton. Ni en Eŭropo estas favorataj, renkontante jam en niaj lingvoj multajn internaciajn esprimojn, kiujn azianoj devas aparte lerni. Sed ilia laboremo kaj lingva scivolo mirinde stimulas ilin por lernado de Esperanto.

Kelkfoje mi havis okazon viziti lernejojn kaj ĉeesti la studhorojn de la angla, nepre la plejfurora

fremda lingvo en Azio. Povraj instruistoj de la angla! Kiel malfacilan taskon ili havas por "angligi" japanojn!

Post vizito al Koreio kaj Japanio eblas nur pli kaj pli estimi Esperanton, kiu, kvankam malgrandskale, donas al siaj uzantoj liberon en uzado kaj nekompereblan plezuron.

Esperanto ja akiras sian veran valoron per interkontinenta komunikado. Ni helpu krei la kondiĉojn en kiuj, en estontaj jaroj kaj jardekoj, la evoluo de Esperanto en Azio stimulos la uzon de la lingvo ankaŭ sur aliaj kontinentoj. ■

* Nove elektita estrarano de UEA.

KORESPONDI DEZIRAS

* La E-Redakcio de Radio Polonia intencas starigi en 1990 novan plenan adresaron de personoj, kiuj interesiĝas pri la regula, senpaga ricevado de programinformiloj kaj aliaj materialoj, ekz. pri la konstruota Centro Zamenhof en Bjäl-istoko. Por eniri la adresaron sufiĉas sendi klare skribitan nomon kaj adreson. La informojn oni sendu al: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Varsovio, Pollando.

* Jadwiga Samborska, 60-j. pensiulino, dez. kor. kaj trovi geamikojn. Adr.: ul. Chopina 2m 2, PL-66-100 Sulechow, Pollando.

* Pop Emil Ioan dez. kor. pri ĉt, interesiĝas pri uŝuo kaj jogo. Adr.: Aleea Peana nr. 11, R 13, ap. 34 Cluj-Napoca, 3400 Rumanio.

* 32-j. Szlykiewicz Ryszard serĉas gekorespondantojn el aliaj landoj por feriado kun ebleco de reciproka gastigado. Adr.: 58-260 Bielawa, os. XXV-Lecia Prl 9/32, Pollando.

* Laudelino de Vicente dez. kor. tm. kun persono kiu bredas ĉinĉilon. Adr.: Caixa Postal 1.826, BR-80010, Curitiba-PR, Brazilo.

* Iwona Frukacz, 19-j. lernantino, dez. kor. tm., interesiĝas pri arkeologio, psikologio kaj literaturo.

Adr.: Drzewna 58, 42-280 Czestochowa, Pollando.

* Ni bezonas multe da korespondantoj de iu ajn aĝo por niaj gelerntoj. Bonvolu sendi adresojn al mi kun indikoj de aĝo, sekso, hobbio, profesio ktp. S/C Claude Cayzac Res, Pic Saint Loup-171 Grand Mail-34080 Montpellier, Francio.

* Kambiz Zad Gaffari, 18-j. studento, dez. kor. tm., interesiĝas pri pm., pk., kaj sporto. Adr.: Shamse Tabrizi str. Eistgahe Garo, Koche Shahid Siabani 16, Tabriz 51358 Iran.

* David Sasanian, 18-j. studento, dez. kor. tm., interesiĝas pri pm., pk., kaj sporto. Adr.: Sarbaze Shahid str. Arshade Birag(koche), 104, Tabriz 51436 Iran.

* Elisa Vazquez, 11-j. knabineto, dez. kor. kun geknabetoj samaĝaj. Adr.: Avenida Alem No 62, 2600 Venado Tuerto, Argentino.

* Janusz Motykiewicz, 44-j., dez. kor. kun gesamideanoj el Ĉinio, Japanio, Usono, Okcidenta Eŭropo pri E-movado, turismo, ĉiutaga vivo kaj aliaj temoj. Gastigado eblas. Respondo garantiata. Adr.: PL-67-240 Kotla Pollando.

* Wei Ping, 33-j. dez. kor. tm., interŝ. diversajn filatelaĵojn kaj E-ajojn. Adr.: Yingwu Gongshang Yinhang, Wuhan, Hubei, Ĉinio.

* Liu Jian, 37-j. laboristo, dez. kor.

tm. Adr.: 21-129-202 Xueweicun, Bantangpu, Xiangtan, Hunan, Ĉinio.

* Wang Hong, 26-j., volas kor. tm., kaj interŝ. pm., bk. kaj librojn. Adr.: Hunan Xinhua Yinshua Yichang, Changsha, Hunan, Ĉinio.

* Wang Kun, 23-j. fraŭlo, dez. kor. tm. Adr.: Tuchan Gao Feng Dian, Nanning, Guangxi, Ĉinio.

* Wang Lixia, 27-j. fraŭlino, dez. kor. tm. Adr.: Tuchan Gao Feng Dian, Nanning, Guangxi, Ĉinio.

* Li Ruijin, 30-j., dez. kor. tm. kun kulturistoj de limakoj. Adr.: Bose State Department Store, Bose, Guangxi, Ĉinio.

* Jia Juncheng, filatelisto, dez. interŝ. seriojn de neuzitaj pm kun esp-istoj en Japanio, Hindio, Tajlando, Belgio, Britio, Danlando, FR Germanio, Grekio, Norvegio, Hispanio, Svedio, Svisio, Kanado, Usono kaj Novzelando. Esperante kaj angle. Adr.: Cao Yang 7 Cun, 61 Hao, 104 Shi, Shanghai, Ĉinio.

* John Thomas, 44-j., dez. kor. kun ĉinaj geesp-istoj pri ĉina kuirarto kaj aliaj temoj. Adr.: 5228 Cedarwood Drive, Raleigh, NC 27609, Usono.

* Ata Mohammad Saqib, 28-j. instruisto, dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: 151/-7H-Pak Darwaza, Multan, Pakistano.

LI QIANG:

Vizito al Golmud sur altebenaĵo

FERVOJO tra Qinghai (Ĉinghaj) kaj Tibeto sur altebenaĵo 2 700-3 000 m. super la marnivelo estas la plej alta en Ĉinio. Veturinte pli ol 800 km. laŭ la norda bordo de la plej granda ĉina sallago Qinghai, trans montojn kaj tra sallagoj, dezertoj kaj herbejoj, la trajno finfine portis min kaj miajn kolegojn el la ĉefurbo Xining (Ŝjining) de Qinghai-provinco en la urbon Golmud, la lastan stacion de la unuap-era konstruado de la Qinghai-Tibeta Fervojo.

Ekster la nova stacio de Golmud, larĝaj stratoj, junaj arboj ambaŭflanke de ili kaj nove konstruitaj kaj konstruataj etaĝdomoj prezentis la aspekton de nova urbo. Wang Tianhe, vicurbestro de Golmud, diris al ni, ke antaŭe tie estis plaĝo de Golmud-rivero. Sur la vasta plaĝo kreskis fragmitoj, tamarikoj kaj sovaĝaj herboj, loĝis neniu kaj preterpasis la lokon nur malmultaj paŝtistoj kun brutoj. Nur en 1954, post la ekfunkciado de la Qinghai-Tibeta Ŝoseo, oni starigis tie kelkajn tendojn, konstruis malgrandan straton kaj fon-

dis tendo-urbeton. Depost 1956 grupoj post grupoj da volontuloj venis tien por konstruado kaj la urbeto prosperiĝis iom post iom. Nun ĝi jam disvolviĝis en la duan grandan urbon de Qinghai kaj fariĝis la plej granda trafika nodo en la okcidenta parto de la provinco, centro por transporti varojn kaj grava pasejo al Tibeto.


Jin Liwu (Ĝin Li'u), ĉefingeni-ero de la Urbo-konstrua Buroo de Golmud, diris al ni, ke laŭ areo Golmud estas la plej granda urbo en la mondo, kun totala areo de 126 mil kvadrataj kilometroj, kaj 7-oble pli granda ol Pekino. La urbo alkiroĉiĝas al Kunlun-montaro sude kaj najbaras kun Qarhan(Ĉarhan)-sallago norde. La areo de ĝiaj distriktoj estas nur 15.72 kvadrataj kilometroj, kun 120 mil loĝantoj. En la jaro 2005 la areo de ĝiaj distriktoj kreskos al 60 kvadrataj kilometroj, kun maksimume 300 mil loĝantoj. La urbo plene utiligos la lokajn riĉfontojn por konstrui sin en modernan industrian bazon kun sal- kaj petrol-kemiaj industrioj kiel la ĉefaj. Samtempe ĝi vaste disvolvos for-

stumadon kaj transformos la naturan fizionomion por fariĝi ĝardeno urbo sur altebenaĵo.

En la sekvanta tago, akompanate de la vicurbestro, ni veturis suden per aŭto laŭ la Qinghai-Tibeta Ŝoseo. La ŝoseo kondukas al Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto. Ĝi estas bone asfaltita. La aŭto veturis rapide kaj de tempo al tempo antaŭiĝis al grandaj kamionoj plensarĝitaj de varoj. La vicurbestro diris, ke tiuj kamionoj transportas varojn al Tibeto. Ĉiujare 85% de la varoj por Tibeto estas transportataj el Golmud. La registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono starigis oficejojn kun 20 000 funkciuloj en Golmud por trakti diversajn aferojn inter Tibeto kaj landinternaj provincoj.

En la tagmezo ni atingis pasejon de Kunlun-montaro, la plej sudan finon de Golmud. Ĉe la pasejo staras ŝtonplato kun gravuritaj ideografiaĵoj "4 767 m. super la marnivelo". La pasejo estas la plej alta super la marnivelo el la loko vizititaj de mi. Starante tie, oni povas vidi la ondantan montaron

Salakvo-kolekta ŝipo sur lago





Parto de Golmud

kaj eternan neĝon sur ĝi okulfrape brilantan en la sunlumo. Senfinaj glaciriveroj kvazaŭ gigantaj blankaj drakoj flugas inter la montoj. Ĉe la montpiedo verdas herboj kaj moviĝas ŝafaroj. La pejzaĝo estas tre bela. Nun la pasejo estas malfermita kiel turisma loko. Ĉiujare multaj turistoj venas tien por ĝui la mirindajn naturajn pejzaĝojn kaj fari ekspediciadon.


Sur revenvojo ni vizitis la hidroelektron Najjili (Najĝjili) sur Golmud-rivero kaj la konstruitan hidroelektron Xiaogangou (Ŝjaŭgangoŭ). Kun totala longo de 468 km., Golmud-rivero fontas el Kunlun-montaro kaj fluas de sudo al nordo tra herbejoj, dezertoj kaj salaj lokoj kaj fine en Dabsanlagon. Ĝia flunivela diferenco estas granda kaj ĝi abundas je hidraŭlikaj riĉfontoj. La tereno de Najjili estas danĝera. Granda baraĵo baras la torentan riverakvon, tiel formiĝis akvorezervejo. Sub la akvo-ellasa kluzo de la baraĵo akvo enĵetiĝas kun bruego. La hidro-

lektron havas tri generatorojn, kiuj povas produkti 9 000 kWh da elektro. La neĝakvo de Kunlun-montaro finis la historion, ke la loĝantoj uzas buter-olean kaj kerosenan lampojn. La loĝantoj intime nomas la elektrajn "neĝa hidroelektron". Post la finkonstruo de Xiaogangou-hidroelektron kun investo de cent milionoj da juanoj, ĝi liveros al Golmud 32 000 kWh da elektro, kio sendube ludos gravan

rolon por urba konstruado kaj industria disvolviĝo.


Vizito al la Qinghai-a Kalisterka Fabriko estis grava por ni. La fabriko troviĝas en la norda parto de la urbo. Forlasinte la urbon, la aŭto veturis tra grasa herbejo punktita de jurtoj. De tempo al tempo ni vidis, ke gregoj da ŝafoj kaj kameloj sin nutras per herboj. Baldaŭ malaperis la herbejo kaj ambaŭflanke de la ŝoseo aperis sal-

La nova stacio de Golmud





Robert C. Emmett (maldekstre) kaj la aŭtoro (dekstre)



La hidroelektrajo Najjili

alkala tero, sur kiu kreskas maldensaj arbustoj. Pli antaŭe estas sala plaĝo kaj vidiĝas neniom da verdo. Mi pensis, ke ni veturas sur Qarhan, la plej granda sekiginta sallago en Ĉinio.

Kvankam Qarhan estas lago, tamen vidiĝas neniom da akvo. Ĉar la lago entenas densan salakvon, sur ĝia surfaco formiĝis dika tavolo da salo, kaj pro tutjara atako de vento kaj sablo la tavolo kovriĝis de flava polvo. La pli-ol-unu-metre dika tavolo povas elteni fortan premon. Ĉiu ĝia kvadrata metro povas elteni 42.5 tunojn da premforto. La Qinghai-Tibetaj Fervojoj kaj Ŝoseo trairas Qarhan-sallagon pere de la sala tavolo. La ŝoseoparto konstruita el salo longas je 31 km. Mi vidis multajn salkavojn ambaŭflanke de la ŝoseo. La ŝoforo diris al mi, ke la salkavoj estas fositaj de vojriparistoj. Kiam ili trovas, ke iu loko sur la ŝoseo estas malebena, ili prenas iom da salo el salkavoj por ripari la ŝoseon.

Baldaŭ granda konstruajaro aperis antaŭ niaj okuloj. Ĝi estas la Qinghai-a Kalisterka Fabriko.

Vere sala mondo! Apud la fabriko domoj amasiĝas salo kiel monteto. Ĉiuj fabriko domoj, loĝejoj, haloj, lernejoj, vendejoj estas konstruitaj sur sala kovraĵo kaj eĉ troviĝas simplaj laborejoj kaj tenejoj kun salaj muroj.

Iu vicĉefingenero de la fabriko diris al mi, ke Qarhan-sallago kovras pli ol 5 800 kvadratajn kilometrojn. Sub la sala kovraĵo estas densa salakvo kaj kristala salo. Pli sube la roksalo dikas je kelkdek metroj kaj la totala rezervokvanto de la salo atingas 60 miliardojn da tunoj. Krom manĝebla salo, abundas ankaŭ kalia klorido, magnezia klorido, litia klorido k.a. Interalie la rezervokvanto de kalia salo konsistigas 97% de la jam konita rezervokvanto en Ĉinio. La Qinghai-a Kalisterka Fabriko estas salindustria entrepreno, kiu kolektas ĉefe kalian salon.

La fabriko estis ekkonstruita en 1958. En 1975 oni komencis fari preparan laboron por fondi entreprenon de kalia klorido kun jara produktokvanto de 200 000 tunoj. En 1986 oni komencis ĝian kon-

struadon kaj en 1989 finkonstruis ĝin. Nun ĝi atingis la atenditan produktan kapablon. Ni vizitis salejon kun akvosurfaco kelkajn km. larĝa kaj salakvo-kolektan ŝipon kaj erco-selektejon kun altnivelaj aŭtomataj ekipaĵoj. En la selektejo mi renkontis s-ron Robert C. Emmett. Li estas altklasa konsilisto el Elmco-kompanio de Teknologijaj Ekipaĵoj de Usono. Preninte plenmanon da blanka kalia salo de sur perrimena transmisiilo, ĝin provinte per fingroj kaj atente rigardinte, li diris al ni, ke estas tre bona la kvalito de kalia salo de Qarhan-sallago. Li tre kontentis ankaŭ pri la funkcio de la filtromaŝino de sia kompanio. Menciinte la duaperiodan konstruon de la fabriko, kun jara produktokvanto de miliono da tunoj, li diris, ke ĝi estas tre granda konstruo kaj havas belan perspektivon.

En 4 tagoj en Golmud ni vizitis multajn fabrikojn kaj bazojn de legomoj kaj gastis en domoj de laboristoj kaj jurtoj de mongolaj paŝtistoj. Profunde impresis min tiu nova vigla urbo sur la altebenaĵo. ■

MOROJ DE LA ANTIKVA TIGRO-KULTURO DE GUANZHONG

Teksto de YUAN YUAN

Fotoj de ZHANG TAO

DE Zhou-dinastio antaŭ pli ol 3 000 jaroj, Huaxian-gubernio de Guanzhong de Shaanxi-provinco plurfoje estis ĉefurbo en la historio kaj tial estas riĉa je historiaj objektoj, kiaj ruinoj de Yangshao-kulturo (ĉ. 5 000 a. K. — ĉ. 3 000 a. K.), diversformaj antikvaj bronzaĵoj kun tigro-kapaj desegnaĵoj.

La tigro-kulturo naskiĝis en prajtempo. La okcidentaj primitivaj triboj kaj iliaj posteuloj translokiĝis al la oriento, mikse loĝis kaj kunfandiĝis kun la orientaj kaj sudaj triboj, kaj tiel formiĝis tigradra kultura. Kiam aperis unueca regpotenco poste en Ĉinio, la tigradra kultura disvastiĝis tra la tuta lando. Tigro — totemo de la antikvuloj, iom post iom fariĝis talismano, beata kaj demon-pela simbolo, post kelk-mil-jara ŝanĝiĝo de socio kaj kredo de la popolanoj. Huaxian-gubernio estas pli multe influata de la tigro-kulturo ol aliaj lokoj, ŝajne pro ĝiaj situo, historio, antikvaj nacioj, socia koncepto k. a. En la tagoj de festo, naskiĝo, edziĝo, funebro kaj eĉ en ĉiutaga vivo la popolanoj ne povas esti sen tigrigra figuro. Adori kaj ami tigron estas moro formiĝinta antaŭ miloj da jaroj kaj heredata en la nuna tempo.

Interalie, bunta mantoo (ĉina vaporumita manĝaĵo el faruno) estas uzata en festaj tagoj kiel plej kara donaco, tial oni nomas ĝin ankaŭ "etiketa mantoo". La etiketa mantoo estas vaporumita el tritika

faruno, kun rozaj makuloj.

Estas plej okulfrapa la Huaxian-a etiketa mantoo kun tigrigra figuro. Kvankam kamparanoj kreas tiajn mantoojn laŭ sia plaĉo, tamen ili devas rigore observi la ĝeneralajn postulojn pri la formo. La mantooj por la sezonaj festoj havas ĉefe la formon de tigrigrido. Ekz., en la Printempa Festo, kiam oni kultas la Ĉielon, Teron, la monan dion kaj prapatrojn, oni preparas mantoojn en formo de "Tigro (ĉine: *hu*) sur jujuba monto", "Du drakoj ludas globon" kaj "Vesperto (ĉine: *fu*)" por peti benon (ĉine: *fu*), kie oni uzas homofonon de la tri ideogramoj. En la festo "Klaro kaj Brilo" (ĉ. la 5-a de aprilo), oni vaporumas tigrigridajn kaj hirundajn mantoojn ne pli ol 3 cm. longajn, pendigas ilin kaj paperajn orajn kaj arĝentajn ingotojn sur salikaj ŝosoj kaj starigas la ŝosojn antaŭ la tomboj de siaj prapatroj por ilin kultu. Krome ili ofertas al siaj prapatroj tiom da kur-tigrigraj mantooj, kiom da viroj estas en la familio. Krome, oni vaporumas ankaŭ tigro-kapajn kaj kapitelajn mantoojn por la viroj en simbolo de ilia gvida rolo en la familio kaj la navetajn mantoojn por la virinoj, kio signifas teksadon. (La viroj faras agrokulturadon kaj iliaj edzinoj teksadon hejme — jen feliĉa familio en la antikva Ĉinio.) En la tria tago post la naskiĝo de bebo, ĝia avino pendigas ĉe ĝia kolo paron da tigrigridajn mantoojn por montri naskiĝon de plia filo en la familio. Laŭ la edziĝa moro, la


edza familiano devas pendigi ĉe la kolo de la novedzino paron da tigrigraj mantooj, antaŭ ol enlasi ŝin en la domon por plenumi la geedziĝan ceremonion.

En la tagoj de naskiĝo, geedziĝo kaj funebro la parencoj, najbaroj kaj amikoj donacas grandan farunaĵon pezan 2-3 kg., longan 1 metron kaj altan duonan metron, en formo de tigrigra kapo, draka korpo kaj fiŝa vosto. La farunaĵoj estas plastike faritaj, sur kiuj estas inkrustitaj diversaj floroj, birdoj, insektoj kaj fiŝoj, homfiguroj el rakontoj. Ekz., en edziĝa festo oni ofte donacas tiujn kun ama metaforo kiel "Abeloj ludas inter krizantemoj", "Fiŝoj petolas kun lotusfloroj", "Pigo bekas umeflorojn", "Du drakoj ludas globon" k. a. Inter la donacaĵoj por edziĝa festo estas grandioza farunaĵo alta je preskaŭ 4 metroj, en formo de tigroj kaj fiŝoj, ĝi estas mirindaĵo el la popolaj artaĵoj de Ĉinio.

Antikva libro notas, ke en la Okcidenta Zhou-dinastio (1066 a. K. — 771 a. K.), kiam virino graviĝis, oni pendigis en ŝia ĉambro bildon de tigrigra nazo (nazo estas signo de prapatro), dezirante ricevi bebon multesperigan kaj bravan kiel tigro. Nun oni malfacile trovas ateston de feta edukado, sed tia moro troviĝas en Huaxian-gubernio. Unu jaron post edziĝo la patrino donacas al sia filino "bebo-ringon", en kies mezo estas dika bebo el tolaĵo, ĉirkaŭe estas alkudritaj tigro (aŭ tigrigra kapo),



Ĉe stando de tigro-formaj ornamaĵoj
Farunaĵo kun tigra figuro por novedzino



Infano kaj tigro-kapaj ŝuoj





Etiketaj mantooj donacitaj de parencoj por la festo de unu-monata bebo



Maljunulo kun etiketa farunaĵo



floroj, fruktoj kaj aliaj bestoj, la ringo pendas surmure en ŝia ĉambro. Tia moro nomiĝas "bebdono". Post naskiĝo de la bebo, la tolaj bestoj, floroj kaj fruktoj estas disdonataj al najbaroj, parencoj kaj amikoj kiel benaĵoj, krom la tolaj tigra kapo kaj dika bebo, kiujn la patrino zorge konservas ĉe si por ĉiam.

Antaŭ ol oni metas labojn en dom-konstruado, ili devas fari kultan ceremonion kaj la parenco de patrino flanko venas kaj oferas mantoojn en formo de staranta tigro kaj koko por peti feliĉon kaj benon. Krome oni starigas tigrakapan ŝtonfoston aŭ ŝtonan kaŭrantan tigron antaŭ la pordo por montri la tradicion de tigra nacio.

la indiĝenoj de Huaxian adoras kaj amas tigron. Nove naskita bebo portas jam tigrakapan ĉapon. Ĉie vidiĝas knaboj portantaj tigrajn ĉapon, antaŭtikon, ŝuojn kaj manikojn.

La lokanoj heredas la tigrakulturon, kiu kuraĝigas ilin energie klopodi kaj brave lukti por prosperiĝo kaj kreo de novaj meritoj. ■

Ĉina ŝako (II)

de RONG HUI

REGULARO

A. Oni devas movi tiun pecon, kiun oni jam tuŝis, kaj repreni la movitan pecon ne estas permesate.

B. Templimigo: Ĝenerale ŝakludo estas sentemplima, sed en konkurso ĉiu el la du partioj devas fari minimume 30 movojn en unu horo kaj poste almenaŭ 10 movojn ĉiudekminute.

C. La malpermesataj movoj:

1. Senĉesa ŝakigo: la ruĝa ĉaro ripete moviĝas dekstren, maldekstren por ŝakigi la nigran ĉefgeneralon (Vd. bildon 1). Tia ripeta ŝakigo estas malpermesata. Se la ruĝa partio ne ŝanĝas la movojn, li perdas la ludon. Fakte la ruĝa partio en bildo 1 povas fari nenion alian movon kaj sekve perdas la ludon.

2. Senĉesa ŝakigo por matigo en sekva movo: (Vd. bildon 2) la




ruĝa ĉaro iras du paŝojn maldekstren por ŝakigi kaj la nigra ĉefgeneralo iras unu paŝon maldekstren. Poste la ruĝa ĉaro denove iras du paŝojn dekstren por matigi la nigran ĉefgeneralon en la sekva movo, kaj la nigra ĉefgeneralo povas nur denove iri unu paŝon dekstren. Tiaj ripetaj movoj nomiĝas "senĉesa ŝakigo por matigo en sekva movo" kaj estas malpermesataj. La ruĝa partio devas ŝanĝi la movojn, se ne, li perdas la ludon.

3. Senĉesa kaptio: (Vd. bildon 3) la ruĝa partio povas fari senĉesan kaption dumaniere: la ruĝa soldato moviĝas dekstren aŭ maldekstren por kapti la nigran ĉaron, kaj la


nigra ĉaro moviĝas maldekstren aŭ dekstren por esti ne kaptita, tiaj ripetaj movoj de la ruĝa soldato apartenas al "senĉesa kaptio" kaj estas permesataj. Se la nigra ĉaro ne ŝanĝas la movojn, estiĝas egaliĝo; la ruĝa ĉefgeneralo iras dekstren aŭ maldekstren por kapti la nigran kanonon, kiu iras dekstren aŭ maldekstren por esti ne kaptita. Ankaŭ tiuj ripetaj movoj de ruĝa ĉefgeneralo apartenas al "senĉesa kaptio" kaj estas permesataj. Se la nigra kanono ne ŝanĝas la movojn, estiĝas egaliĝo.

Ĉ. Gajno kaj perdo: mato de ĉefgeneralo, ne plu farebla movo, konfeso de perdo, foruzo de difinita limtempo, faro de malpermesitaj movoj pli ol 3-foje kontinue, en unu el tiuj kvin okazoj oni perdas ludon kaj la alia partio gajnas.

D. Egaliĝo: neniu el ambaŭ partioj havas eblecon de gajno; ambaŭ partioj volas paciĝi; ili ambaŭ faras malpermesitajn movojn kontinue, ne ŝanĝante movojn.



Interesa ĉina puzlo (I)




Laŭ la peto de legantoj ni konigas la ĉinan puzlon ekde la nuna numero.

La Red.

Havigu al vi kvadratan kartonon kun kolora papero gluita sur ĝi. Tranĉu la kartonon en 7 partojn laŭ la jena bildo. Jen estas ĉina puzlo.

La ludo estos multe pli interesa, se vi havos plurajn diverskolorajn puzlojn en malsama grandeco.

Jen kelkaj mozaikoj. Kredeble vi elfaros pli multe da interesaj bildoj.



Pri la poemo “Forlaso de Baidi en la mateno”

de DI ZI

*En matenruĝo mi forlasis la
monturbon Baidi¹,*

*Ĉe la tagfin' alvenas jam
Jiangling² post mil lioj³.*

*Boat' malpeza preterpasis jam
mil kaj mil montojn,*

*Eĥas ankoraŭ ambaŭborde la
simiaj krioj.*


La poemo estas verkita de granda poeto Li Bai de Tang-dinastio. En 759 p.K. li estis ekzilita al Yelang (la orienta regiono de la nuna Guizhou-provinco) pro sia partopreno en la milita agado de Li Lin, la 16-a filo de imperiestro Xuanzong (Ŝjüanzong). Kiam li atingis la antikvan urbon Baidi ĉe Yangzi-rivero en ekziliĝo, li informiĝis, ke li estas amnestiita. Li, kvazaŭ birdo liberigita, tuj reveturis al Jiangling per boato.

La poemo estas saturita de romantismo, kunfandante naturan pejzaĝon kaj sentojn. La urbo Baidi situas sur la supro de monto kaj super ĝi ŝvebas nuboj ondantaj kaj brile radiantaj. Tio reflektas la gajan humoron de la aŭtoro post la amnestio. En la poemo li emfazas la rapidecon de la reveturado per jenaj vortgrupoj: “en matenruĝo... ĉe la tagfin’”, “post mil lioj”, “boat’ malpeza”, “mil kaj mil montoj” kaj

“eĥas ankoraŭ ... simiaj krioj,” kio montras la fortan deziron de la aŭtoro reveni al Jiangling kiel eble plej baldaŭ. La Tri Gorgoj estas danĝera parto de Yangzi-rivero, kie troviĝas multe da rifoĵoj kaj akvokirloj. Sed en la poemo oni spertas nur facilan senton sen ajna korpremo, ŝajnas, ke ĉio danĝera forglitas per unu fojo. Ĝenerale, simiaj krioj ja triste impresas. Sed en tiu poemo iliaj krioj donas tute alian impreson: rapidado de la boato kaj gaja humoro de la aŭtoro.

La pentraĵo estas farita de s-ro Chen Xiwei (Ĉen Ŝjiŭej), kiu lertas fari pejzaĝan pentraĵon. Li bildigis la scenon de la poemo per sia lerta tekniko. La verko elspiras viklecon kaj glatecon. Kvankam en la pentraĵo ne vidiĝas la urbo Baidi, tamen oni povas senti, ke ĝi ekzistas ĝuste en densaj koloraj nuboj faritaj per intensa tuĉado. Oni kvazaŭ aŭdas senĉesan kriadon de simioj en la arbaroj. La boato, tre malpeza, ŝajne flugas en la rivero. La sobra kaj freŝa stilo de la pentristo bone akordiĝas kun gaja humoro kaj romantisma temperamento de la poeto.


La pentristo faris ankaŭ kaligrafiaĵon en rapida manskribo.




Kaligrafiaĵo de Chen Xiwei

La fortaj kaj liberstilaj strekoj ĝin plibeligas. ■

1. Baidi (Bajdi), monturbo en Sichuan-provinco.
2. Jiangling (Ĝjangling), gubernio en Hubei-provinco.
3. Unu li-o egalas al duonkilometro.





KURANTAJ AFEROJ ● KURANTAJ AFEROJ ● KURANTAJ AFEROJ

● De la 6-a ĝis la 9-a de novembro 1989 la 5-a Plena Sesio de la 13-a Centra Komitato (CK) de la Komunista Partio de Ĉinio (KPC) okazis en Pekino. La sesio decidis akcepti la abdikon de kamarado Deng Xiaoping pri lia prezidantecco de la Milita Komisiono de CK KPC kaj nomumi kamaradon Jiang Zemin prezidanto de la Milita Komisiono de CK KPC. Kamarado Jiang Zemin estis elektita kiel ĝenerala sekretario de CK en la 4-a Plena Sesio de la 13-a Centra Komitato de KPC.

● Post klopodo de 40 jaroj la totala produktokvanto de energi-fonto de Ĉinio 40-oble kreskis de 23 710 000 tunoj da norma karbo en 1949 al 958 000 000 tunoj en 1988.

● Plenumiĝis la konstruado de la Yangzi-a Etilena Fabriko en Nankino de Jiangsu-provinco, kies 10 kompletoj da grandaj kemiindustriaj instalaĵoj povos produkti 300 000 tunojn da etileno kaj 450 000 tunojn da aromata hidrokarbono.

● Post Francio kaj Japanio, ankaŭ Ĉinio konstruis grandjonan akcelilon en Lanzhou de nordokcidenta Ĉinio. Ĝi estas nemalhavebla instalaĵo por la fundamenta esploro de grandjono de nuklea fiziko kaj por la centro de praktika esploro de grandjonaj faskoj. Ĝi estas grava sciencsplora frukto akirita de Ĉinio post la finkonstruiĝo de la

Pekina Elektron-pozitona Koli-ziilo.

● La plej freŝa statistiko raportas, ke cent milionoj da ĉinoj fariĝis asekuratoj kontraŭ diversaj okazaĵoj, 60 000 000 familioj kaj posedaĵoj en valoro de 1 800 miliardoj da juanoj estas asekurataj kontraŭ akcidento.

● 37 000 komercistoj de 98 landoj kaj regionoj partoprenis en la Aŭtuna Foiro de Ĉinaj Eksportaĵoj de 1989 okazigita en Kantono. Dum la foiro Ĉinio interkonsentis kun alilandaj komercistoj eksporti varojn de 5.571 miliardoj da usonaj dolaroj. Tio estis la rekorda cifero por la foiro.

● En la periodo de januaro ĝis oktobro de 1989 la eksportitaj varoj de Ĉinio valoris 40.8 miliardojn da usonaj dolaroj. La sumo superis tiun de la sama periodo de 1988 je 10.3%.

● La Ĉeĥoslovaka Kompanio de Ekstera Komerco kaj la Maŝinimporta kaj -eksporta Kompanio de Ĉinio kontraktis interkonsenton en internacia ekspozicio okazigita en la Shenzhen-a Speciala Ekonomia Distrikto, ke Ĉeĥoslovakio aĉetos de Ĉinio universalajn maŝinojn kaj elektrajn aparatojn en valoro de 500 000 svisaj frankoj.

● La bankoj de Ĉinio jam asignis specialan pruntodonon de 400 000 000 juanoj por helpi parton de entreprenoj in-

vestitaj de alilandaj komercistoj en malfacilo de kompletiga kaj cirku-la kapitalo pro la ĉina ekonomia reguligo.

● La 6-a Antarkta Esplora Grupo de Ĉinio forlasis la landon kaj veturis per la ŝipo "Jidi" je la 30-a de okt. 1989.

La esplorado daŭros duonjaron kaj la ŝipo navigos 27 000 marmejlojn. La sciencistoj faros tie sintezan observadon pri la 3-5-jara vigla periodo de la suno kaj esploron pri la evoluo de la medio de antarktaj glaciriveroj en la pasintaj dekmil jaroj.


● Por la unua kranio de "pekina simihomo" trovita en 1929 estis diversaj asertoj pri ĝia aĝo. Lastatempe profesoro de la Ĉina Politekniko determinis per nova metodo la aĝon de la pekina simihomo je 578 000 jaroj. Tio solvis la problemon zorgatan de ĉinaj kaj alilandaj arkeologoj.

● Lastatempe ĉinaj kaj alilandaj natursciencistoj raportis sian esploran frukton pri la Yin-ruina kulturo de Ĉinio kaj vekis atenton de multaj fakoj.

Yin-ruino troviĝas en Xiaotun-vilaĝo de la urbo Anyang de Henan-provinco. Ĝi estis ĉefurbo de Shang-dinastio (16-11-a jc. a.K.) en la posta periodo. La bronzaĵoj, skribaĵoj sur ostoj kaj testudaj ŝeloj kaj urbanizado de tiu loko montris la brilan kulturon de antikva Ĉinio.

● Artefarita pulmo de internacie

La Yangzi-a Etilena Fabriko



Li Jing (dekstre) kaj Li Chunyang sur podio



avangarda nivelo lastatempe estis sukcese provfarita en la Kvara Militmedicina Universitato kaj klinike aplikata en pli ol 110 operacioj en 11 hospitaloj de Pekino kaj Ŝanhajo, kaj dum tio oni trovis nenium komplikajon pro la uzo de la artefarita pulmo.


- En la lastaj jaroj fakuloj faris enketon al ĉina aktinidio (*Actinidia chinensis*) kaj trovis ĝiajn 57 speciojn, 39 variojn kaj 5 aberaciojn. Tio montris, ke Ĉinio posedas en la mondo la plej multajn speciojn de aktinidio, la plej vastan troviĝon kaj la plej abundan rikolteblan kvanton de ĝiaj sovaĝaj fruktoj.

- Lastatempe naskiĝis en Nankino la unua ĉina provtuba laktobovo el fridigita ovo eksterkorpe fekundigita. La bovido estas virseksa kaj sana kaj pezas 36.5 kg. Tia eksterkorpa fekundigo postulas nur 10% de la pago por la enkorpa fekundigo.

- En la pasinta jaro la semajna gazeto "Ĉina Filmo" okazigis elektadon de dek filmosteloj en la 40 jaroj post la fondiĝo de la popola respubliko. Zhao Dan, Bai Yang, Cui Wei, Sun Daolin, Yu Lan, Wang Xingang, Xie Fang, Liu Xiaoqing, Pan Hong kaj Jiang Wen ricevis la honoran titolon.

- En la 22-a de okt. 1989 ĉina gimnasto Li Jing gajnis la ĉampionecon de paralelado en la 25-a Monda Gimnastika Ĉampioneca Turniro okazigita en Stuttgart de FR Germanio. Poste ĉinaj gimnasto Li Chunyang kaj gimnastino Fan Di akiris orajn medalojn de rekado kaj ŝtupa paralelado.

La grandjona akcelilo en funkciado



Esp-kurso en la Pekina Radio-instituto



KOMISIITE de la Ĉina Esperanto-Ligo, Radio Pekino, Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, Redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj Ĉina Esperanto-Eldonejo, la Pekina Radio-instituto ekfunkciigis Esp-kurson la 28-an de la lasta septembro en sia fremdlingva fakultato. Antaŭ 20 jaroj la instituto funkciigis similan kurson kaj elkulturis profesiajn esperantistojn.

La nuna Esp-kurso havas 12 lernantojn el la instituto. Ĝi daŭros du jarojn. La ler-

nantoj studas, krom Esperanto, ankaŭ la internacian ĵurnalistikon. Post du jaroj ili laboros en la supre menciitaj organizoj.

En la kurso lernas ankaŭ du junuloj el Qingdao (Ĉingdaŭ), kie okazos la Kvina Pacifika Esperanto-Kongreso en 1992.

La kursanoj deziras respondi kun samideanoj de ĉiuj landoj pri literaturo, ĵurnalismo, radiodisaŭdigo kaj E-movado. Skribu al: Esperanta kurso, Pekina Radio-instituto, Dingfuzhuang, 100024, Beijing, Ĉinio. ■

En la hejmloko de orĉevalo kaj jadvoko

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN

La kapo de bovo ornamita per floroj



TRANSIRINTE Jinsha-riveron, ni surpaŝis la teritorion de Yunnan-provinco kaj komencis nian vojaĝon laŭ la lasta parto de Linguan-vojo sur la Suda Silka Vojo.

ORĈEVALO KAJ JADKOKO

Dayao, ĉe la suda bordo de Jinsha-rivero, fondiĝis en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.- 23 p.K.) kaj ricevis la nomon Qingling-gubernio pro Qingling-rivero trafluanta ĝin de norde suden. En 1274 ĝi ekportis la nomon Dayao.






Yunnanyi

Bildo de orĉevalo kaj jadjkoko



Florornamo sur muro



de la silka vojo, sudaj trezoroj estis transportataj en la tiaman ĉefurbon kiel tributoj. Grandaj orpecoj kaj jadpecoj estis admirataj de la korteganoj. Legendo diras, ke tie oni povas vidi orĉevalon kaj jadkonon flugantaj inter altaj klifoj kaj aŭdi iliajn kriojn resonantajn super kornicaj vojoj. En la periodo de 73-49 a.K. la kortego sendis serĉi sude trezorojn — oron en formo de ĉevalo kaj jardon en formo de koko. La senditoj iris laŭ Lingguan-vojo kaj fine mortis de malsano survoje, ne trovinte la trezorojn.

Pasis pli ol dumil jaroj. Oni neniam vidis la orĉevalon kaj jadkonon. Kun transloĝiĝo de lokanoj kaj interfluo de kulturo, la legendo cirkulis de la bordo de Qingling-rivero al tiu de Dianchi-lago. Hodiaŭ la orĉevalo kaj jadkoko estas la simbolo de Kunming, la ĉefurbo de Yunnan-provinco, kaj ĝia emblemo surhavas iliajn bildojn.

Dayao, kiel poŝtstacio ĉe la limo inter Sichuan kaj Yunnan sur la antikva silka vojo, ĝuas la antaŭan gloron. Sur la supro de la montpinto Wenbi staras blanka, Qingchui-pagodo, kiu konstruiĝis en la lastaj jaroj de Tang-dinastio (618-907).

Ĝi, 18 m alta, el brikoj, estas originala kaj prenas formon de tipa hindia pagodo. Sur ĝia okangula bazo staras okangula fusto kun 12 kornicoj, kiu subtenas elipsan korpon supre grandan kaj malsupre malgrandan. Ĉe la kvar flankoj de la supra parto de la korpo estas po unu niĉo sen budhostatuo. Sur brikoj defalintaj de la pagodo oni trovis han-lingvan kaj sanskritan surskribon. La pagodo estis konstruita en la posta periodo de Nanzhao-regno, kiam furoris budaismo, tamen ĝi montris la longan historion de la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Hindio.

SALO KAJ LA SILKA VOJO

Shiyang-urbeto 35 km nordokcidente de Dayao abundas je blanka putsalo. De dumil jaroj la urbeto prosperas en salfarado kaj saltransportado. Negoco pri salo ludis pozitivan rolon en la longdistanca komercado sur la silka vojo. Tiu antikva ekonomia fenomeno akcelis kulturen disvastigon. Antaŭ tre longe Dayao produktis salon. Legendo diras, ke iu ŝafistino paŝtis ŝafaron tie siatempe, la ŝafaro lekis teron kaj ne volis reveni malgraŭ ŝia pelado. Oni fosis kavon kaj


trovis salakvon, kaj la kavo nomiĝis blankŝafa puto. Pro malsamaj manieroj por fari salon, la salo de Shiyang-urbeto dividiĝas en blankan kaj nigran. En Tang-dinastio tieaj indiĝenoj faris salon per jenaj metodoj: Oni verŝis sufiĉan salakvon sur brullignon, bruligis ĝin ĝis karbiĝo kaj prenis salgrajnojn de sur la karbo; aŭ oni verŝis salakvon sur fajre ruĝan karbon kaj en la sekva tago prenis salon de sur la karbo. Ambaŭ metodoj estas preskaŭ samaj, t.e. fari salon en fajro. En la komenco de la 20-a jarcento tieaj indiĝenoj faris salon per alia metodo: meti kelkajn terakotajn tasetojn kun salakvo sur fajron kaj verŝi en ilin la densan, kiam la salakvo sekiĝis, tion ripetadi plurfoje, demeti kaj malvarmigi la tasetojn kaj elŝuti el ili la salon, kiu estas blanka, nepika kaj fajna.


Farado kaj transportado de salo akcelis la disvolviĝon de kulturo kaj komerco. Dayao, kiel poŝtstacio sur la antikva silka vojo, prosperigis komercadon sur la antikva vojo per vigla saltransportado. En Yuan-dinastio (1271-1368) la itala vojaĝisto Marko Polo vidis sur Lingguan-vojo, ke en la sudokcidento cirkulas speciala mono salo. Tiu mono servis kaj kiel varo kaj kiel interŝanĝa perilo de varoj.

FLORORNAMA FESTO

La 8-a de la dua monato laŭ la luna kalendaro estas la Florornama Festo de ji-oj. Tiutage, oni kolektiĝas ĉe Tanhua-monto en Dayao de malproksime je centoj da kilometroj. Tiam azaleoj en plena florado kovras la monton. La ruĝa azalefloro estas simbolo de bonaŭguro. Oni surmetas floringon plektitan el azalefloroj sur la kolon de gasto, aŭ metas azaleflorojn antaŭ pordon, litkapon, stalon aŭ ĉe kamprandon. Per tio oni deziras sanan kreskon de la homoj, prosperon de la brutoj kaj riĉan rikolton. Gejunuloj fiksas freŝajn florojn sur la kapoj de siaj amat(in)oj por esprimi amon inter si.

Azaleo, speco de rododendroj,





Bronza ĉerko elterigita en Yunnanyi

Domo de ji-oj

kreskas sur monto je altitudo de ĉ. 2 500 m. Ĝi kun multaj specioj kaj longa florado estas frostorezista. Tieaj ji-oj prenas azalefloron kiel sian familian nomon, montrante sian profundan amon al ĝi. Oni diras, ke antaŭ tre tre longe iu saĝa kaj bela ji-a virino de Tanhuamonto mortigis lokan reganton per vino kun florveneno por helpi la suferantajn fratinojn kaj pro tio ŝi oferis sian vivon. Ŝia edzo, portante ŝin en la brakoj, ploregis per sangaj larmoj kaj la sango ruĝigis la azaleflorojn sur la monto. Tiu kortuŝa rakonto ĉiam cirkulas inter la popolanoj.

En la festo oni ankaŭ fiksas azaleflorojn sur la kapoj de bovoj, lavas al ili la buŝon per salakvo kaj paŝtas ilin sur monto. Sekvante la bovaron, oni dancas kaj kantas ĉe azaleoj kun granda plezuro. Oni nomas tiun tagon Bovkulta Festo. Post tio komenciĝas printempa plugado.

KOLORAJ NUBOJ SUDE APERINTAJ

Veturinte de Dayao sudokcidenten, ni atingis la lokon, kie aperas koloraj nuboj. Tio estas Yunnanyi de Xiangyun-gubernio.

Historia noto diras, ke en la periodo de 122-117 a.K. imperiestro Wu ofte rigardis suden al koloraj nuboj. Li opiniis tion favora aŭspicio kaj sendis sekvi ilian spuron. La senditoj venis al Yunnanyi ĉirkaŭita de montoj kaj riveroj. Ili opiniis, ke en tiu kvietaj loko finiĝas la koloraj nuboj. Poste, Handinastio starigis tie gubernion kaj donis al ĝi la nomon Yunnan.

Arkeologiaj eltrovoj atestas, ke Yunnanyi estis sufiĉe riĉa loko. En la 60-aj jaroj oni prifosis tie oblongan tombon de loka reganto. En ĝia ĉambro estas bronza ĉerko 2 m longa, el 7 bronzaĵaj platoj. Ĝia duklina tegmento estas farita el 2 bronzaĵaj platoj kaj ĝiaj flankoj el 4 tiaj platoj. Sub la fundo el unu bronza plato estas mulditaj 12 piedoj. Ambaŭ flankoj de la ĉerko surhavas geometriajn desegnojn, nubajn striojn kaj bildojn de aglo, hirundo, tigro, leopardo k.a. Oni

konstatis, ke la tombo estis konstruita en 465 a.K. ±75j.


Oni ankaŭ elfosis bronzaĵajn manĝbastonetojn en la tombo. Tiaj manĝbastonetoj estas tradiciaj manĝiloj de han-oj kaj enkondukiĝis en multajn aziajn landojn kaj regionojn. Tiuj historiaj objektoj, kiuj havas kaj trajtojn de nacimallimultoj kaj stilon de han-oj de la centra Ĉinio, estas sendube produktaĵoj de ekonomia kaj kultura interŝanĝo inter la naciecoj.

Ekveturinte de Chengdu, Sichuan-provinco, ni iris sume ĉ. 1 500 km kaj atingis Dali de Yunnan-provinco, trairinte Ya'an kaj Xichang. Laŭ historiaj notoj, en tiu parto de la antikva silka vojo estis sume 51 poŝtstacioj; laŭ la nuna distriktodivido, apud ĝi estas 22 gubernioj kaj urboj, 6 regionoj kaj nacimallimultaj aŭtonomaj subprovincoj. Tiu parto servas kiel ĉefa arterio de la Suda Silka Vojo. En la sekvanta artikolo ni konigos alian arterion de la silka vojo — la vojon Wuchidao. ■



Il aj knasinoj en la Floronama Festo

La blanka pagodo sur la montpinto Wenbi



“Peonia Kiosko” de Tang Xianzu kaj la operoj de la dinastioj Ming kaj Qing

de MEI ZHI

PROSPERIGIS en Ĉinio la opera verkado de post la meza periodo de Ming-dinastio (1368-1644). Estis precipe brilaj la atingoj de legendaj operoj. Tang Xianzu estis elstara verkisto tiutempa. Lia reprezenta verko “Peonia Kiosko” estas unu el la plej eminentaj verkoj en la teatra historio de Ĉinio.

Tang Xianzu (1550-1616) estis ambicia jam en sia juneco. Li iam prezentis raporton al la imperiestro, en kiu li kritikis malbonkonduitojn de iuj ŝtatoficistoj kaj pro tio estis degradita. Fine li forlasis ŝtatan oficon kaj ermitiĝis pro malobeo al la plutokratoj kaj superuloj. Tang Xianzu vivis en sia hejmo 18 jarojn, kiam li sin okupis ĉefe pri legado, verkado kaj instruado de siaj gefiloj. Lia majstra verko “Peonia Kiosko” estis plenumita ĝuste en tiu periodo.

“Peonia Kiosko” alinomiĝis “Reviviĝo”. Ĝi estis eminenta romantikisma verko en la teatra historio de Ĉinio. Per la amhistorio de Du Liniang kaj Liu Mengmei, la aŭtoro fervore prikantis la spiriton kontraŭ feŭdisma etiko kaj aspiron al libera amo kaj emancipo de individuco.

Du Liniang, solfilino de Du Bao, la prefekto de Nan’an, estis rigore edukita en feŭdisma familio jam de la infaneco. Ŝi ja atingis la aĝon de edziniĝo, tamen ŝiaj gepatroj malpermesis al ŝi kontakti kun junuloj. Dum tri jaroj ŝi neniam iris en la hejman ĝardenon. La soleca vivo tedis ŝin. Foje ŝi iris en la ĝardenon, instigate de servistino Chunxiang (Ĉunŝjang). Tie prosperis diversaj floroj kaj ĝoje kantis birdoj. La bela printempo vekis ĉe ŝi fortan deziron pri amo. Reveninte en sian ĉambron, ŝi endormiĝis de laco. Ŝi songis: En la ĝardeno iu juna kaj bela klerulo derompis salikan frondon kaj prezentis ĝin al ŝi. Poste li brakumis ŝin kaj portis ŝin en la Peonian Kioskon. Ili brakumis kaj karesis unu la alian. Kiam ili estis en granda ĝojo, falis petalo de arbo. Liniang vekigis kaj kriis: “Mia kara! Kien vi foriris?” Ŝian krion aŭdis ŝia patrino. Post pridemando la patrino ŝin riproĉis. Post tio Liniang fariĝis pli morna kaj la scenoj songitaj de ŝi foj-foje aperis en ŝia cerbo. Ŝi refoje venis en la ĝardenon. Tie ĉio estis kiel en la songo, sed ne vidiĝis la klerulo. Ŝi fariĝis pli moroza kaj ŝia menso fariĝis malklara. Ŝi malsaniĝis serioze kaj forlasis la homan mondon. Ekster atendo efektive ekzistis la klerulo renkontita de Liniang en la songo. Li estis bela kaj malriĉa junulo Liu Mengmei (En la ĉina lingvo *Liu* signifas salikon, *meng* songon kaj *mei* umefloron). Tiujare li iris al la ĉefurbo por partopreni en ŝtata ekzameno. Survoje li malsaniĝis en Nan’an

kaj loĝis provizore en la Templo Umefloro. Iutage li promenis ĉe la ĝardeno de Liniang kaj hazarde trovis keston kun portreto de Liniang. Li estis mirigita de ŝia beleco kaj la vortoj sur la bildo “apud umefloroj kaj salikoj”. La animo de Du Liniang sopiris al Liu Mengmei kaj nokte eniris lian ĉambron. La du gejunuloj ĝojiĝis de la renkontiĝo. Du Liniang diris al la amato sian spertaĵon kaj petis lin malfermi ŝiajn tombon kaj ĉerkon. La junulo faris tion laŭ ŝia peto. Vere reviviĝis Du Liniang. Post tio ili venkis serion da malfaciloj. Fine Liu Mengmei fariĝis altrangulo, sukcesinte en la superklasa ŝtata ekzameno kaj edziĝis al ŝi. La opero finiĝis per ilia feliĉa geedziĝo.

“Peonia Kiosko” elstarigis la kontraŭdiron inter la realo kaj idealo pere de priskribo de strangaj intrigoj. Ĝi elspiras fortan romantikan koloron kaj havas fortajn re-

Portreto de Tang Xianzu



alan signifon kaj epokan trajton. En Ming-dinastio la feŭdisma etiko severe katenis kaj subpremias la virinojn, kies batalo por rompi la katenon estis malfacila. Du Liniang estis unu el la plej elstaraj virinoj sur la scenejo en tiu socia medio. La fantaziaj intrigoj pri la morto de Du Liniang pro la sonĝo kaj ŝia reviviĝo efike prezentis la ŝanĝigon de la karaktero de la heroino kaj pro tio ŝi preferis morti ol vivi kaj kuraĝe strebis. Katenate de feŭdisma etiko, ŝi ne povis efektiviĝi sian esperon kaj sekve de tio plenumis tion en la sonĝo kaj eĉ mortis pro la sonĝita amato. Por ŝi la morto ne estis finiĝo de la vivo, sed komenco de la nova vivo. Ŝiaj esperoj neefektivegeblaj en la reala vivo tamen realiĝis post la reviviĝo. Tia forta, longdaŭra kaj neŝanĝebla strebo neniam vidiĝis en la antaŭaj amrakontoj. Tial la opero kuraĝigis la gejunulojn strebantajn en la amafero, kaj eĉ hodiaŭ oni multe respektas Tang Xianzu, dramiston, kiu efike prezentis sian epokan idealon.

Verki operon per poezia verk-maniero estis komuna trajto de multaj ĉinaj dramistoj. Tiuflanke Tang Xianzu estis pli distinga. Multaj paragrafoj en la opero "Peonia Kiosko" similas al liriko.

Krom "Peonia Kiosko" Tang Xianzu verkis ankaŭ "Purpura Fluto", "Purpura Harpinglo", "Okazaĵo en Handan (Altrangulo en Sonĝo)" kaj "Okazaĵo en Nanke (Principa Edzo en Sonĝo)". La lastaj tri kaj "Peonia Kiosko" kune nomiĝas ankaŭ "kvar sonĝoj de Linchuan" (Linchuan estis naskiĝloko de Tang Xianzu). Li verkis ankaŭ iujn poemojn kaj prozaĵojn. Kompreneble lia "Peonia Kiosko" estas la plej sukcesa kaj influa.

En 1644 la feŭdisma Ĉinio estis ekregita de la dinastio Qing, la lasta feŭdisma dinastio de nia lando. Ĝi estis feŭda regpotenco fondita de Nūzhen (Njuĝen)-nacio en la nordorienta parto de Ĉinio. La impona kampano insurrekcia renversis Ming-dinastion kaj, profitante de la ŝanco, la armeo de Qing sin trudis en Pekinon, subpremias la kampanon insurekcion kaj kaptis regpotencon de la centra registaro. Post tio ĝi faris militon por unuigi la landon. Tial, en la komenca periodo de Qing-dinastio ekzistis akra kontraŭdiro inter la superaj regantoj unuflanke kaj Han-nacio kaj nacimalplimulto aliflanke. Senĉese leviĝis batalo kontraŭ Qing-registaro kaj la socio estis en malkvieto.

En Qing-dinastio naskiĝis Suzhou-skolaj dramistoj kun Li Yu kiel reprezentanto. Iliaj verkoj spegulis la malkvietan realon en la fino de Ming-dinastio kaj la komenco de Qing-dinastio. En la verkoj ili aŭ prezentis gravajn historiajn eventojn kaj tiamajn politikajn batalojn aŭ esprimis sian propran penson pere de la realaj temoj, tial iliaj operoj havis pli fortan realisman koloron ol tiuj de Ming-dinastio. La iom pli malfruaj Hong Sheng kaj Kong Shangren heredis la eminentan tradicion de la legendoj de Ming-dinastio kaj samtempe prezentis la prosperon kaj pereon de la ŝtato. Iliaj verkoj "Longviva Halo" kaj "Ventumilo de Persikfloroj" estis la plej altnivelaj el la tiamaj operoj.

La historio de Li Yu (1591? — 1671?) nun estas jam nekonata. Laŭdire li verkis pli ol 60 operojn, el kiuj 17 estas trovitaj. Liaj operoj "Malproksima Vojaĝo pro la Patro", "Qian Zhong Lu" (Ĉjan Ĝong Lu, Detronigita Imperiestro kaj Liaj Korteganoj) kaj "Lojaluloj" elspiras ĉiu sian epokan trajton. La unua rakontas, ke en la komenca periodo de Qing-dinastio Huang Xiangjian

(Huang Ŝjangĝjan) faris malproksiman vojaĝon por serĉi sian patron. La verko prezentis la filan amon de la heroo kaj spegulis ankaŭ tiaman malkvietan socian realon. Ĝi malkaŝis la putran Sudan Ming-regnon kaj kruelaĵojn de Qing-armeo. "Lojaluloj" estis verkita kune de Li Yu kaj iu alia. Ĝi prenis la justan batalon de Donglindang-anoj kontraŭ la reakcia regantaro kiel sian temon kaj sukcese modlis sentiman kaj neflekseblan figuron de Donglindang-ano Zhou Shunchang (Ĝou Ŝunĉang). Samtempe ĝi vivece prezentis malsamajn karakterojn de diverstavolaj homoj en la arda amasa batalo.

Hong Sheng (1645-1704) vivis en la militaj jaroj de la komenca periodo de Qing-dinastio por unuigi la tutan landon. Lia reprezenta verko "Longviva Halo" naskiĝis dank' al lia pli-ol-10-jara penado. Ĉar ĝia prezentado okazinta en la funebra tempo de la imperiestr-edzino malobservis la difinon de la kortego, li estis eksigita kaj revenis al sia hejmloko. Morna kaj enua, li pasigis siajn lastajn jarojn en turismo kaj fine mortis de drono pro nokta ebriiĝo.

"Longviva Halo" kun la ribelo de An Lushan kaj Shi Siming en Tang-dinastio (618-907) kiel la fono prezentas la amon de la imperiestro Xuanzong (Ŝjüanzong) kaj lia edzino Yang Yuhuan, rakonton delonge cirkulantan inter la popolanoj. La opero surscenigis ĝin kun nova fizionomio. La verko komenciĝis de la amjurado de la imperiestro kaj lia amatino kaj bildigis ilian luksan vivon, diboĉadon kaj amon. Spertinte morton kaj vivon, ilia amo leviĝis al nova nivelo. La scenoj "Sopiro de la Mortinto", "Sonorado" kaj "Sonĝo en Pluvo" prezentis ilian sinceran senton pri la amjuro. Fine ili kortuŝis la Ĉielon kaj Dion, kiuj promesis al ili fariĝi feoj kaj kunvivi eterne. Sub la plumo de la verkinto, la temo de rakonto pri amo fariĝis pli riĉa kaj la homfiguroj pli vivecaj. Pere de la amrakonto la verkinto elvolvis pli vastajn sociajn scenojn, spegulis komplikajn kontraŭdirojn kaj batalojn en la feŭda socio, esprimis siajn patriotan penson kaj demokratian konscion kaj faris la operon plej sukcesa kaj grandinflua.

Kong Shangren (1648-1718) interesiĝis pri poemoj, prozaĵoj kaj muziko jam de la juna aĝo. Post kiam li spertis la vivon de ŝtata oficisto kaj kontaktiĝis kun la socia realo, li iom post iom konis la putron de la burokrata regado. Li do esprimis sian mornan penson en la verkado. "Ventumilo de Persikfloroj" estis lia verko en tiu periodo.

"Ventumilo de Persikfloroj" estis historia opero pri pereado de la Suda Ming-regno. Ĝi prenis la amon inter Hou Fangyu kaj Li Xiangjun (Li Ŝjangĝjun) kiel la ĉefan pensfadon. Ĝi koncentre spegulis komploton kaj batalon inter la altranguloj de la Suda Ming-regno. Antaŭ alveno de la malamiko ili senskrupule diboĉis kaj seksumis, preferis kapitulaci al la malamiko ol cedi al siaj kontraŭuloj interne de la reganta klico. Tio estis la historia leciono kaŭzi pereon de la regpotenco. Hou Fangyu estis literatura gvidanto de la fama Fushe-societo. Li ludis ian rolon en la batalo kontraŭ la malicaj eŭnukoj kaj iliaj komplotoj, kiuj multe damaĝis la ŝtaton. Sed antaŭ la nacia pereado, li vivis diboĉe. La kantistino-putino Li Xiangjun ja estis politike sobra. Ŝi juste riproĉis Hou Fangyu, ŝanceliĝantan en la ŝtataj aferoj, kaj influis lin per sia klara politika sinteno. Dank' al sia politika sinteno preferi morti ol humiliĝi al intrigema kortegano, ŝi fariĝis unu el la plej brilaj virinoj sur la ĉina teatra scenejo. ■

Songô

(La deka akto el la opero "Peonia Kiosko" de Tang Xianzu)

Fraŭlino Du Liniang: (Eniras kaj kantas)
Vekite de kantado de orioleoj,

Belan printempon mi vidas en la korto.

Ĉambristino Chunxiang: (Eniras kaj kantas)

Forbruliĝas ambra incenso,

Malordiĝas la kapornamo.

Ĉu belas kutime ĉi-printempo?

Liniang: (Kantas)

Frumatene mi rigardas foren,

Hararango falas malorde.

Chunxiang: (Kantas)

Kun hararango hirundforma,

Vi rigardas ĉe balustrado.

Liniang: (Kantas)

La fadenoj de ĉagreno senordaj

Implikiĝas pli malgraŭ ordigo,

Leviĝas afliktoj senkaŭzaj.

Chunxiang: (Kantas)

Jam ordonon al la hirundoj kaj orioleoj,

Ke ili pruntedonu printempajn scenojn.

Liniang: Chunxiang, ĉu vi sendis balai la vojon en la ĝardeno?

Chunxiang: Jes, mi jam aranĝis la aferon.

Liniang: Portu al mi la vestojn kaj tualetan skatolon.

Chunxiang: (Eliras kaj revenas kun vestoj kaj tualeta skatolo, kantante)

Hararango zorgema antaŭ la spegulo,

Silka vesto bonodora de parfumo,

Fraŭlino, jen viaj vestoj kaj tualeta skatolo.

Liniang: (Kantas)

En korto kvieta flirtas filandroj,

Dum longa tempo mi ordigas kapornamaĵojn.

En la spegulo mi vidiĝas,

La hararango honteme kliniĝas.

(Paŝas) Kiel mi min beligas hodiaŭ?

Chunxiang: Hodiaŭ la tualeta faras vin pli ĉarma.

Liniang: (Kantas)

Elegantaj helbrilas la vestoj karmezinaj,

Graciaj tremetas harpingloj kun gemoj inkrustitaj.

Zorgeman tualeton mi ŝatas delonge,

La belan printempon neniu rimarkas.

Mia belo fiŝojn, birdojn mirigas,

Kaj lunon kaj florojn humiligas.

Chunxiang: Bonvolu al matena manĝo.

(Kantas paŝante) Rigardu:

Rebrilas koridoro ore farbita,

Verdas muska perono antaŭĉambra.

Paŝo sur herbejo min skrupuligas,

Ke koto novajn ŝtrumpojn makulas.

Tintiletoj sur floroj sonoras,

Birdoj de la averto forflugas.

Liniang: Kiel oni povus ĝui la printempon, se ili ne venus en la ĝardenon. (Kantas)



Songô

*Floroj ĉarmaj plene disvolviĝas,
Ilin kadukaj muroj akompanas.
Por kiu pretiĝas la bela pejzaĝo?
Kies domon regas ĝuoplezuro?*

Miaj gepatroj neniam menciis al mi la printempan belon.

*Farbitaj traboj similaj al matena nuboj,
Bambuaj kurtenoj al vespera pluvo,
Kune ili ornamas verdan kioskon.
Fadenoj da milda pluvo,
Flokoj da facila vento,
Distriĝas kun kanoto kolora en nebulo.
Mastrino de la buduaro
Admiras la printempan belon.*

Chunxiang: Escepte de peonio ĉiuj floroj ekfloris.

Liniang:

*Ruĝaj rododendroj verdan monton tegas,
Trans rubusaro fumkolonoj ebrietas.
Ho Chunxiang,
Plej ĉarma estas peonio,
Sed ĝi ne la unua floras printempe.*

Chunxiang: Jen orioleoj kaj hirundoj en paroj.

Liniang kaj Chunxiang: (Kune kantas)

*Oblikva rigardo enua direktiĝas foren,
Plezura melodio de birdoj ŝvebas soren.*

Liniang: Vi iru.

Chunxiang: Mi neniam enuigiĝos de tiel ĉarma ĝardeno.

Liniang: Ne parolu pri tio! (Paŝas kaj kantas)

*Min ne rilatas ĉarma ĝardeno,
Neniam helpos trairi da kioskoj dekduon.
Preferinde hejme pasigi enuigan tagon.*

(Geste montras, ke ili revenis en la buduaron)

Chunxiang: (Kantas)

*Nun mi malfermas la halon okcidentan,
Kaj bonordigas ŝian liton en hal' orienta.
En vazon mi metis freŝajn azaleojn,
Kaj en ujo movigas la incenson.*

Via fraŭlina moŝto, bonvolu ripozi, kaj mi nun iras al la damo. (Foriras)

Liniang: (Veas)

*De promenado mi revenas silente,
Kaj mi min ornamas denove.*

Ho printempo, mi ĵaluzas vian foriron. Kiel mi pasigos la tempon post via foriro? Kia dormiga vetero! (Vokas) Chunxiang, Chunxiang! (Rigardas ĉirkaŭen) Ho ĉielo, efektiva estas la diro, ke printempo estas sezono ĉagrena. En multaj poemoj legiĝas junulinoj, kiuj sopiras amon printempe kaj perdas ĝin aŭtune. Mi, 16 jar-aĝa, ankoraŭ ne havas idealan amaton. (Suspiras) Mi naskiĝis en plutokrata familio, ankoraŭ ne trovis idealan edzon, kvankam mi jam plenkreskis. Mi vane pasigas la junecon. La tempo flugas sagrapide. (Larmas) Mi estas bela kiel floro, sed mia sorto pli mizera ol folio. (Kantas)

En aflikto la printempo pasas lante,

De enuo sopiranto plendas triste.

Pro mia denaska belo,

Oni donos min al plutokrato.

Ho ve, atendo de bonŝanco

vanigos mian junecon.

Kiu rimarkis mian dormemon?

Min ĉagrenas ofta honto.

Mi dronas en sonĝo,

Kiam forfluas printempo.

Al kiu mi plendu?

Min turmentas mizera sorto,

Tion eksplikas la ĉielo.

Ho, mi laciĝis kaj dormetu ĉe la tablo. (Dormas)

Juna klerulo Liu Mengmei: (Kun salika frondo en mano iras en ŝian sonĝon)

Oriolo kantas ĉarme en suna tago,

Fraŭlo ĝojas je vido de belulino.

Mi venas sekvante fraŭlinon Liniang. Kie nun ŝi estas! (Rigardas returnen) Ha, fraŭlino! (Liniang leviĝas surprizite kaj rigardas al la junulo)

Liu Mengmei:

Ĉie mi serĉis vin, sed vi estas ĉi tie. (Liniang silente rigardas al li oblikve)

Liu Mengmei: Mi derompis salikan frondon en la ĝardeno. Franjo, vi ja estas multscia. Ĉu mi povus peti vin improvizi versaĵon por la salika frondo?

Liniang: (Montras kaj surpriziĝon kaj ĝojon kaj hezitas respondi) (Diras al si) Mi ne konas lin, kaj por kio li venas ĉi tien?

Liu Mengmei: (Kun rideto diras) Fraŭlino, mi pasie amas vin! (Kantas)

Vi belas kiel floro,

Ĉie vin serĉas mi pro via ĉarmo,

Dum vi sola sopiras en via ĉambro.

Fraŭlino, ni interparolu aliloke. (Liniang restas senmove pro honto. Liu Mengmei tiras ŝin je la vesto.)

Liniang: Kien?

Liu Mengmei: Post la peonia bedo, tuj apud la rokaĵo ĉe la lageto.

Liniang: (Mallaŭte) Por kio iri tien?

Liu Mengmei: (Mallaŭte)

Vian veston mi malbutonos,

Vian zonon mi malligos.

La volupton ni ĝuu,

Amkarese ni kuŝu.

(Liniang ruĝiĝas de honto. Liu Mengmei brakumas ŝin kaj ŝi forpuŝetas lin.)

Ambaŭ: (Kantas)

Ŝajne renkontiĝis ni ie,

Kial do silentas ni ĉifoje?

(Liu Mengmei eliras, brakumante Liniang.)

Dio de floro: (Eniras en ruĝa vesto kaj kun floroj en la mano) Mi, dio de floro de la ĝardeno, antaŭvidis, ke fraŭlino Liniang edziniĝos al juna klerulo Liu Mengmei en la estonteco. Printempa sceno vekis ĉe ŝi sopiron al amo kaj ŝi vidis en la sonĝo Liu Mengmei. Mi domaĝas ĉion belan kaj devas protekti la floran knabinon. Nun mi venas gardi por ilia feliĉa amorĝuo. (Kantas)

Li, pasia al amo,

Kiel vermo moviĝas de seksardo.

Ŝi, ĝue tremetas en amoro,

Kiel floro sur ŝoso.

Ilin kunigas la destino,

Ĉiuj iliaj faroj estas sola fantazio.

Fi, la perversaĵo kotigas la floran kioskon.

Nun mi devas vekti ŝin. (La dio levas petalon kaj ĵetas ĝin al la enirejo de la scenejo.)

Karmemore ŝi tenas la sonĝon en la koro,

Dispreme ili detruas floron.

Ho, la juna klerulo, vi estas dolĉa en la sonĝo. Vekite li devos eskorti la knabinon en ŝian buduaron. Nun mi devas foriri. (Eliras) (Liu Mengmei kaj Liniang eniras mano en mano.)

Liu Mengmei: (Kantas)

Feliĉan momenton ni havas destinite,

En floroj, sur herbotapiŝo ĝuas kuŝe.

Kiel vi sentas vin, fraŭlino? (Ŝi mallevas la kapon kaj li kantas denove)

Hararanĝon ringan riparu,

Diademon buntan remetetu.

Ho fraŭlino, ne forgesu:

Ni brakumadis preme,

Ni karesis amore,

Kunfandiĝon deziras pasie.

Liniang: Ĉu vi foriras?

Liu Mengmei kaj Liniang: (Kune kantas)

Ŝajne renkontiĝis ni antaŭe,

Kial do silentas ni ĉifoje.

Liu Mengmei: Franjo, vi laciĝis. Bone ripozu (Li kondukas ŝin al la tablo kaj ŝi pozas dormanta. Li frapetas ŝin) Franjo, nun mi foriras. (Retrorigardas) Franjo, bone ripozu kaj mi revizitos vin poste. (Eliras)

Liniang: (Vekiĝas kaj mallaŭte vokas) Sinjoro, sinjoro! Ĉu vi foriris? (Denove dormas)

Damo Du: (Eniras kaj kantas)

Mia edzo funkcias prefekte,

Filino distras sin hejme.

Sur ŝiaj vestoj-jupoj

Brodiĝas birdoj en paro.

(Diras) Mia infano, kial vi dormas ĉi tie? (Liniang vekigiĝas kaj ankoraŭ vokas la junan klerulon.)

Damo: Kio okazis al vi?

Ŝulda krizo de la disvolviĝantaj landoj

de LIU GUANGXI

DE aŭgusto 1982, kiam en Meksikio eksplodis la ŝulda krizo, jam pasis pli ol sep jaroj. Dum tiu tempo la internacia socio, la okcidentaj financaj rondoj kaj la disvolviĝantaj landoj klopodis solvi ŝuldan krizon. Naskiĝis unu post alia diversaj projektoj por solvi la problemon, kiaj Baker-plano, propono de Kiichi Miyazawa, establo de Fonduso de Interrez-rilatuma Kompensado, kapitaligo de debeto. Sed la eksteraj ŝuldoj de la disvolviĝantaj landoj ne nur ne reduktiĝis, sed kontraŭe rapide pliiĝis. La totala sumo de la ŝuldoj kreskis de 831 miliardoj da usonaj dolaroj en 1982 al 1 300 miliardoj en 1988,

kun jara kreska rapideco de 7%. Kaj multaj debetaj landoj devas pagi kiel ŝuldon 50-70% de la enspezoj akiritaj per eksportado de varoj.

La pli kaj pli pezaj ŝuldaj ŝarĝoj de la disvolviĝantaj landoj estas kaŭzigitaj kaj de iliaj propraj enlandaj ekonomiaj problemoj kaj de la internaciaj politikaj kaj ekonomiaj faktoroj.

Unue, la politiko de alta intereza rilatumo de la okcidentaj disvolviĝantaj landoj, precipe de iu potenco, multe pezigas la ŝarĝon de la debetaj landoj. En la tuta mondo la leviĝo de 1% de la interezo plipagigas al la debetaj landoj 6

miliardojn da usonaj dolaroj ĉiujare. La disvolviĝantaj landoj ĉiujare devas pagi interezon de 50 miliardoj da usonaj dolaroj por la depruntita mono.

Due, la serioza financa misfluo pli malriĉigas la debetajn landojn kaj pli riĉigas la kreditajn landojn. La aŭtoritata enketa raporto "En la Sama Mondo" lastatempe publikigita montras, ke la neta depruntita mono de la disvolviĝantaj landoj reduktiĝis de 104 miliardoj da usonaj dolaroj en 1982 al 26 miliardoj en 1988 kaj en tiu periodo la nedepruntita mono enfluinta en la disvolviĝantaj landojn estis nur 2 miliardoj da usonaj dolaroj. Tio klare montras, ke pli kaj pli

Liniang: (Leviĝas de surpriziĝo) Ho, panjo!

Damo: Mia infano, kial vi ne faras kudradon aŭ legas librojn por vin distri? Kial vi dormetas ĉi tie?

Liniang: Ĝus mi promenis en la ĝardeno kaj la varmeta printempo ĉagrenis min. Mi reiris en la ĉambron, sed tie nenion trovis por distrado kaj ekdormis de laco. Pardonon al mi.

Damo: Mia infano, ne iru en la senhoman ĝardenon.

Liniang: Jes, mi memoras.

Damo: Mia infano, nun iru al la legoĉambro.

Liniang: Forestas la instruisto kaj mi povas iom malstreĉi min.

Damo: (Veas) Jam plenkreskis la filino kaj certe multe fantazias. Lasu ŝin neĝenata. Jen la filino libera, la patrino zorgoplena. (Eliras)

Liniang: (Longe suspiras, sekvante la patrino per la okuloj) Ho ĉielo, kiel feliĉa hodiaŭ mi estas! Ĝus mi promenis en la ĝardeno kun floroj prosperantaj, kaj la pejzaĝo vekis ĉe mi melankolion. En enuo mi reiris en la ĉambron kaj endormiĝis. Subite mi vidis belan junulon en flora aĝo. Kun salika frondo, li petis: "Franjo, vi ja multe legis librojn. Bonvolu improvizi versaĵon por la frondo." Sed mi pensis, ke mi ne devas senpripense respondi al tiu fremdulo. Kiam mi hezitis, li diris al mi kelke da karesaj vortoj kaj portis min malantaŭ la kioskon apud la peonia bedo, kaj spertis amorĝuon. Ni

ambaŭ delektiĝis de tio kaj dromis en kareso kaj tenero. Post tio li kondukis min en la ĉambron kaj plurfoje petis min ripozi. Kiam mi estis adiaŭonta lin, eniris mia patrino. Vekite en malvarma ŝvito, mi konsciis, ke tio estas nur sonĝo. Mi leviĝis kaj salutis la patrino, kaj la patrino pridemandis. Aŭskultante, mi tamen rememoris sole pri la sonĝo. Mi ne povas kvietiĝi kaj sentas, ke mi perdis ion valoran. Ho panjo, vi urĝas min legi, sed kiu libro povos helpi min elliberiĝi el la melankolio? (Larmas) (Kantas)

Apenaŭ el sonĝo ĝuoplena,

De panjo trude vekita.

Treniĝas mi, ŝvita, kun paŝ' lanta.

Kia laco,

Kia tristo,

Bone estas tuj endormiĝi.

Chunxiang: (Eniras)

Antaŭ dormo diademon demetu,

Antaŭ dormo litaĵon parfumu.

Fraŭlino, ĉu mi parfumu la litaĵojn kaj vi enlitiĝu?

Liniang:

Dormiĝon tujan mi deziras,

Parfumi litaĵojn jam ne bezonas.

Ĉielo,

La sonĝon proksiman mi postkuru.

(Falas la kurteno)

malgrandiĝas mon-enfluo de la disvolviĝintaj landoj al la disvolviĝantaj landoj.

Trie, la disvolviĝintaj landoj praktikas protektismon, kio malhelpas la eksporton de la disvolviĝantaj landoj. La krudmaterialoj kaj primaraj produktaĵoj havas pli kaj pli malgrandan debiton en la internacia merkato. Suferas perdon tiaj disvolviĝantaj landoj, kiuj sin apogas sur eksporto de nur unu aŭ kelkaj produktopecoj. Tio metis multajn disvolviĝantajn landojn en maligantan ŝuldan cirkulon.

Kvare, la specifaj favoroj por la disvolviĝantaj landoj difinitaj en la Ĝenerala Konvencio pri Tarifo kaj Komerco restas nur sur papero. La interkonsentoj de la ĝenerala konvencio aspektas favoraj al la disvolviĝantaj landoj, sed pro la ekonomia postĝinteco, strukturo de monotona produktaĵa eksporto kaj malalta kapablo de organizado de eksporto la disvolviĝantaj landoj fakte ne povas ĝui la favorojn kaj tial ne estas ĝojiga ilia eksporta perspektivo.

Kvine, la malakordo de opinioj de la disvolviĝintaj landoj malhelpas la naskiĝon de efika projekto por solvi la ŝuldan problemon. Ekz. Usono opinias, ke antaŭ ĉio oni devas solvi la problemon de la 15 plej peze ŝarĝitaj debetaj landoj, sed Francio opinias, ke en la Internacia Mona Fonduso la dek plej riĉaj landoj posedas specialan tratan rajton, kiun oni neniam uzis kaj devas parte cedi al la plej malriĉaj landoj. La malakordo malhelpas ellaboron de taŭga projekto far la disvolviĝintaj landoj kaj iliaj komercaj bankoj, dume la disvolviĝintaj landoj kaj internaciaj financaj organizoj postulas, ke la disvolviĝantaj landoj reguligu sian ekonomion kaj praktiku reduktan politikon.

Krome, ankaŭ la nuna leviĝo de regioniĝo de internacia ekonomio malbone influos la solvon de la ŝulda krizo. La apero de la Granda Eŭropa Merkato en 1992, la Usona-Kanada Liberkomerca In-

terkonsento valida ekde la 1-a de januaro de la pasinta jaro kaj la Orient-azia Ekonomia Cirklo, kiun nun oni intencas establi, kvankam efikaj por la internacia komerco, tute sin karakterizas per ekskluziveco kaj protektismo, kio certe turnos la komercajn batalojn inter landoj en tiujn inter grupojn. La disvolviĝantaj landoj renkontos pli grandajn malfacilojn en la situacio de ekonomia grupiĝo kaj plipeziĝos la ŝuldoj sur ili.

Fronte al la ĉiam malboniĝanta situacio de la ŝuldoj de la disvolviĝantaj landoj, la okcidentaj disvolviĝintaj landoj ellaboris planojn unu post alia por solvi la ŝuldan krizon. En la Seula Konferenco en 1985 Usono ŝanĝis sian sintenon, akceptis la konsilon de Japanio kaj elmetis Baker-planon. Sed la plano havas fatalan malfortecon, ke la okcidentaj komercaj bankoj devas doni pliajn pruntojn. La bankoj ne faras aktivan pruntodonon al la disvolviĝantaj landoj kaj sekve malsukcesis la plano. Junie de 1988 la japana financa ministro Kiichi Miyazawa proponis, ke la disvolviĝantaj landoj akiru pruntodonon de la okcidentaj komercaj bankoj en formo de emisio de obligacioj. La propono estis draste kritikata de la usona registaro, kiu opinias, ke la propono transigos la riskon de solvo de ŝulda krizo de privataj bankoj al la registaroj kaj tiel seriozigos la aferon. Post interkonsiliĝo en la 10-a de la lasta marto la usona registaro elmetis Bradie-planon, kiu intencas per la destinitaj sumoj de la Monda Banko kaj la Internacia Mona Fonduso malpezigi la ŝuldojn de la disvolviĝantaj landoj, kondiĉe ke la lastaj rapide reguligu sian ekonomion kaj akcelu enlandajn deponojn kaj investojn. La nova plano altiris la atenton de diversaj landoj, kiuj opinias, ke la plano estas pli perfekta ol la antaŭaj. Sed la plano estas malproksima de la intereza celo de la komercaj bankoj, sekve ĝis nun la okcidentaj komercaj bankoj ne ekagis pro skrupulo.

En novembro 1988 la reprezentantoj de la brazila registaro kaj de la Internacia Kredita Banko kunvenis en Nov-Jorko por subskribi pako-negocan interkonsenton pri rearanĝo de la ŝuldo de 82 miliardoj da usonaj dolaroj de Brazilo. Tio estas la plej grava interkonsento pri reguligo de ŝuldo. En la lasta junio la ekonomia sistemo de Latin-Ameriko proponis, ke oni reduktu 50% de la ŝuldo kaj interezo de la latin-amerikaj landoj kaj la lastaj emisioj obligaciojn por 30-40 jaroj kun interezo de 5% por kovri la restan ŝuldon. La disvolviĝintaj landoj kaj iliaj komercaj bankoj ne aprobis tion.

La supre menciitaj proponoj kaj faroj celas nur, ke la okcidentaj komercaj bankoj kaj internaciaj financaj organizoj donu novan pruntan, pligrandigu financon helpon kaj nuligu parton da ŝuldo, sed ne povas radikale ŝanĝi la maligantan ŝuldan staton de la disvolviĝantaj landoj. Pro la drasta kresko de intereza rilatumo en la unua duono de la pasinta jaro la totala ŝuldo de la afrikaj landoj pliiĝis je 10 miliardoj da usonaj dolaroj. La azia-pacifikaj disvolviĝantaj landoj havas ŝuldojn sub la meza nombro de la mondo, sed en 1988 ili portis ŝuldon de 314 miliardoj da usonaj dolaroj. Ĝis la fino de la lasta aŭgusto la totala ŝuldo de la debetaj landoj konsistigis jam duonon de la totala nacia produktovalor. Ne estas senkaŭze, ke en la Naŭa Konferenco de Ŝtatestroj de Nealiancigitaj Landoj oni forte petis kiel eble plej rapide solvi la ŝuldan problemon de la disvolviĝantaj landoj.

Kvankam la ŝulda krizo jam vekis grandan atenton de la okcidentaj landoj kaj la internacia socio, kiuj elmetis planojn kaj proponojn, tamen neniu el ĉi tiuj estas praktika por solvi la problemon. Oni deziras, ke la okcidentaj landoj tuj ŝanĝu sian ŝanceliĝantan sintenon por la solvo de la ŝulda problememo. ■

La termofonta konvaleska hospitalo Xiaotangshan

JE 30 km norde de Pekino estas fama termofontaro Xiaotangshan (Ŝjiaŭtangŝan). De Qing- (Ĉing)-dinastio (1644-1911) tie estis sanitarejo speciala por imperiestroj kaj aristokratoj. En 1951 la ĉina registaro konstruis tie sanatorion, t.e., la pekinan konvaleskan hospitalon Xiaotangshan.

Enirinte ĝin, mi tuj vidis ĝian ĉarman medion. Meze de ĝi ondetas montetoj kun akvo kaj freŝa aero. Oni diris: "Paciento sentas sin bone tuj post sia eniro."

Kuracisto Li Sansheng konigis al mi, ke en la hospitalo estas du termofontoj kun temperaturo de 45°-54°C, kiuj, kun multspecaj kemiaj komponaĵoj kaj malmultaj radioaktivaj elementoj, kiaj uranio, radiumo kaj radono, apartenas al la kategorio de altvarmaj fluor-entenaj fontoj. En la lastaj jaroj oni boris tervarmajn putojn por kuraca celo.

La hospitalo estas provizita per 750 malsanulaj litoj kaj avangardaj ekipaĵoj. En ĝi laboras 207 kuracistoj kaj flegistinoj. La hospitalo kun 5 kuracaj fakoj servas ĉefe al suferantoj de dermatozo, reŭmatismo kaj reŭmatoidaj malsanoj; de malsanoj de sistemoj digesta, spira, kardiovaskula kaj nerva; de osta traŭmatismo, sekvaĵo de krania traŭmatismo, cerbovaskula afekcio kaj de gerontologiaj malsanoj. Ĝis nun la hospitalo akceptis ĉ. 40 000 pacientojn, kun pli ol 290 kazoj. 80% el ili ricevis bonan kurac-efikon.

Survoje al kuracaj fakoj li diris al mi, ke por kuraci pacientojn, la hospitalo alprenis diversajn metodojn, kiaj termofonta terapio (hidroterapio), akupunkturo, tizano, kiropraktiko, ĉigong-terapio, fizioterapio kaj parafina terapio. Tial necesas malsamaj kuracmetodoj por malsamaj kazoj. Tamen la ĉefa metodo estas termofonta terapio.


Mi informiĝis de Cai Mingrui, vicprofesoro de la unua kuraca fakoj, ke ili kuracas psoriazon. Paciento Qiu (Ĉiŭ) suferis de blazoza psoriazo jam 21 jarojn. Li estis kuracata plurfoje, sed vane. En malpli ol duonjaro post sia enhospitaliĝo li 40-foje ricevis termofontan kuracadon kaj, krome, ultraviolan radiadon kaj retrovis la sanon. Paciento Zhang (Ĝang) suferis de eritroza psoriazo jam sep monatojn kaj 96% de lia haŭto estis lezita. En la hospitalo li 70-foje ricevis termofontan kuracadon kaj, krome, ultraviolan radiadon. Post malpli ol tri monatoj li resaniĝis kaj elhospitaliĝis.

Poste, Cai montris al mi statistikon pri kurac-efiko sur 100 malsanuloj enhospitaliĝintaj en la dua duono de 1976. 34% de ili tute resaniĝis, 47% preskaŭ resaniĝis, 16% ricevis rimarkindan kurac-efikon kaj 3% pli-malpli da kurac-efiko.

Mi suferas de reŭmatismo kaj volis scii, kiel ĝin kuraci. Respondeculo de la tria kuraca fakoj kondu-

Pacientoj ekzercas sin per skermado.





Pacientoj faras gimnastikajn ekzercojn en termofonta banejo.

kis min en la kuracĉambro. Tie mi vidis, ke pacientoj kuŝas aŭ sidas en bankuvoj kun akvo de 36°-43°C. Ili enkuviĝas komence por 15 minutoj kaj iom post iom por 20 minutoj ĉiufoje. Tion ili faras ĉiutage aŭ en ĉiu dua tago. Ĉiu kurac-periodo konsistas el 15-20 fojoj. Ĝenerale, pacientoj devas havi du periodojn kaj nemalmultaj tri periodojn. Unu-du semajnoj etendiĝas inter du periodoj. Por plenumi ĉion ĉi, pacientoj devas pasigi en la hospitalo 60 tagojn. En alia kuracĉambro mi trovis, ke pacientoj staras en du kaĝosimilaj duŝuoj. Sur ĉiu fera tubeto estas multaj truetoj, tra kiuj ŝprucas termofonta akvo sur la tutan korpon de la pacientoj. La elŝprucigita akvo donas premon al la korpo kaj helpas kuracadon.

Meze de iu vasta ĉambro kuŝas granda baseno plenigita per termofonta akvo. Pacientoj staris en ĝi kaj faris gimnastikajn ekzercojn. Kuracisto Li diris al mi, ke tiu gimnastiko kuracas ne nur artikan reŭmatismen, sed ankaŭ aliajn malsanojn.

La respondeculo de la tria kuraca fako diris, ke dum multaj jaroj 90% de la pacientoj kuracataj en tiu fako ricevis bonan kurac-efikon. Li fieris pro tio kaj invitis min sperti la kuracadon.

Akompanate de kuracisto Li, mi rigardis la ruĝon de la bandomo por la imperiestra patrino Cixi (Ciŝji) de Qing-dinastio. La domo kroĉiĝas al montodeklivo kun akvo kaj arboj ĉirkaŭ si. Por longigi sian vivon, Cixi ofte banis sin tie per termofonta akvo. La domo antaŭlonge detruigis en milito, kaj nun restas nur kelkaj ŝtonaj basenoj, kie ŝi baniĝis.

En la kvara kuraca fako min akceptis juna kuracisto. Ŝi diris, ke en tiu fako estas pacientoj suferantaj de parta aŭ tuta paralizo. Por efike kuraci ilin, kuracistoj antaŭ ĉio aplikas fizioterapion, fizik-ekzercan terapion, akupunkturaron kaj kiropraktikon kaj poste termofontan terapion. Dum multaj jaroj 80% de la pacientoj ricevis bonan kurac-efikon. Ŝi transdonis al mi stakon da kajeroj kun registritaj kazoj. Dum foliumado mi trovis, ke pacientino Zhao

Fulan (Ĝaŭ Fulan) suferis de tutkorpa paralizo pro cerba hemoragio. Ŝi estis portita en la hospitalon per brankardo. Post unumonata kuracado ŝi povis leviĝi, kaj post pliaj du monatoj ŝi povis stariĝi.

La 43-jara karboministo Huang Yuke paraplegiigis en 1988 pro laborakcidento kaj pro tio li ne povis reteni sian fekon kaj urinon. En iu hospitalo li ricevis operacion, kiu ne donis bonan efikon. En la komenca tempo post sia veno en la konvaleskan hospitalon, li portis nenian esperon sur resaniĝo. Post unumonata kuracado li povis levi la gambojn je 40-50 gradoj, post du monatoj li povis iom stari ĉe la lito subtenate de alia homo, kaj post duonjaro li povis iri apogante siajn manojn sur paralelo. Nun li povas iri ĉ. 1 000 metrojn helpate de instrumento, kaj normaliĝis la fekado kaj urinado. Mi vizitis lin kaj legis sur lia rida vizaĝo esperon por la vivo.

Ĉe la adiaŭo mi demandis kuraciston Li, ĉu la hospitalo akceptas alilandajn pacientojn. Li respondis kun rideto: "Ĉiu alilanda paciento estas bonvena al ni." ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1990

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.50	25.5	35.5
Aŭstrio	ATS	210	350	490
Belgio	BEF	600	980	1350
FR Germanio	DEM	32	52	72
Britio	GBP	9	14.5	20
Finnlando	FIM	70	115	160
Francio	FRF	100	160	220
Hispanio	ESP	1500	2400	3400
Italio	ITL	20000	32500	45000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35	59	83
Nov-Zelando	NZD	21	35	49
Portugalio	PTE	1500	2400	3400
Svisio	CHF	26	43	62
Usono	USD	15	25	35
Kanado	CAD	15	24	34

Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11 18 25

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.5 12 17

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJISHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

ESP-NOVAĴOJ

● De la 29-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro 1989 en la urbo Suzhou Esperantaj instruistoj el la Pekina Instruista Universitato, Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, Ŝandong-a Universitato, Xi'an-a Fremdlingva Instituto kaj aliaj 11 altlernejoj okazigis kunvenon de Esperanto-instruado, faris akademian interŝanĝon kaj fondis la Ĉinan Societon de Esperanto-Instruado en Superaj Lernejoj. La kunvenon ĉeestis ankaŭ Jiang Miaorui, estro de la Departemento de Altlerneja Eduko sub la Eduka Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko, kaj reprezentantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo, Radio Pekino, Ŝanhaja Eldonejo de Fremdlingva Instruado kaj Ŝanhaja Fremdlingva Eldonejo de Sonkaj Bildbendoj.

● La Pekina Radio-Instituto funkciigas Esp-kurson por kulturaj profesiajn esperantistojn. En ĝi lernas 12 studentoj elektitaj el la dua klaso de la instituto. Post du jaroj ili laboros en la Ĉina Esperanto-Ligo, Redakcio de "El Popola Ĉinio", Ĉina Esperanto-Eldonejo, Radio Pekino kaj Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio. Ilin instruas Li Shijun, Li Yuping k.a.

● Dum s-ro So Gilsu, estrarano de UEA, vojaĝis al la suda ĉina urbo Nanning por partopreni la Azian Konferencon de Esperanto-Instruado, li gastis en Pekino, kie li intervidiĝis kun respondeculoj de la Ĉina Esperanto-Ligo, Redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj en la 3-a de novembro 1989.

● Invitite de la Sapporo Esperanta Societo de Japanio la ĝenerala sekretario de Shenyang-a Esp-Asocio vizitis la urbojn Sapporo, Kawasaki, Tokio, Otaru kaj To-

makomai inter la 3-a kaj 17-a de septembro 1989. Dume la gastiganto kaj gasto diskutis pri fondo de ĝemelaj Esp-organizoj de la urboj Sapporo kaj Shenyang. Ambaŭ flankoj esprimis, ke ili sendos instruistojn, kursanojn, membrojn kaj gvidantojn de la Esp-organizoj viziti unu alian por plifortigi interkomprenon kaj amikecon kaj akceli la disvolviĝon de la Esp-movado.


● Por larĝigi la vidkampon de infanoj kaj vastigi interŝanĝon kun aliaj landoj, la Geknaba Domo de Tianjin funkciigas Esp-kurson kun la arta grupo "Mevo" kiel bazo. Per sia prezentado la infanoj diskonigas Esperanton.

● Finiĝis la dua Esp-kurso en la Oceanografia Universitato de Qingdao. 64 studentoj bone plenumis la lernadon. Jam ekfunkciis la kvara kurso.

● En Zagreb (Jugoslavio) okazis de la 25-a ĝis la 31-a de aŭgusto la 23-a Pupteatra Internacia Festivalo, en kiu partoprenis 22 ensembloj el 13 landoj. Kvar teatraĵoj de la programo okazis en Esperanto: pupteatro "Ĝojo" ("Radost") Brno, Ĉeĥoslovakio; teatro "Du Fust", Montelimar, Francio; ŝtata pupteatro "Banialuka" el Bielsko Biala en Pollando kaj familia teatro de Roza Nikolova kaj Miroslav Cvetanov el Sofio (Bulgario).

● Inter la 11-a kaj 15-a de septembro okazis Esperanto-kurso en Nikolaus-von-Weis-Gimnazio en Speyer/F.R.G. Dekdu gelernantoj elektis kaj vigle partoprenis la kurson gvidatan de Franz-Georg Rössler.

● Inter la 24-a kaj 27-a de majo 1990 la Kultura Esperanto-Festivalo 3 okazos en la mezgranda kaj malnova urbo Västerås (Vesteros), Svedio. Ĝi daŭre estas kelktaga festo por la originale vekita Esperanto-kulturo kaj forumo por kulturamantoj kaj



La arta grupo "Mevo" en provludo



Membroj de Esperanto-kurso en Nikolaus-von-Weis-Gimnazio en Speyer

kulturagantoj, kiuj volas renkontiĝi, prezenti kaj diskuti en agrablaj cirkonstancoj.

● En la urbo Duisburg (Rur-regiono), FR Germanio okazis la 15-a "Universiade" (sporta festivalo de la tutmonda studentaro). Kolektiĝis preskaŭ 3 000 gestudentoj, venintaj el 90 ŝtatoj por konkursi en kvar sportbranĉoj. La Esperanto-grupo de Duisburg uzis la bonan ŝancon informi Esperanton per stando dum 5 tagoj. Tio atentigis milojn da spektantoj pri la internacia lingvo. Pli ol 300 personoj petis pli precizajn informojn.

● S-anino de FR Germanio Ellen Eggers mortis je la 19-a de oktobro 1989 pro malsano en Hamburgo. En 1907 ŝi naskiĝis en la ĉina marborda urbo Qingdao. Ŝi havis sinceran kaj profundan amon al Ĉinio. Ŝi plurfoje vizitis Ĉinion kaj starigis amikecon kun ĉinaj samideanoj. Ŝia forpaso tre dolorigis la ĉinajn esperantistojn.



Čielarko

de TAN SHUQING



La suno kaj grupoj

de ZHANG TONG

Fotografiaj verkoj


En mateno

de LIANG LICHANG



Rakontoj konataj de ĉiuj familioj en Ĉinio

de LIU XIAOYANG



BOVISTO KAJ TEKSISTINO, kolekto de ĉinaj popolaj rakontoj, eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo en 1988. Formato: 11 × 18 cm. 54 p. Prezo: USD 1.60.

Kiel la unua leganto mi finlegis la libreton sub la titolo de “Bovisto kaj Teksistino” kun granda plezuro.

Pro ŝato de ĉinaj popolaj rakontoj, antaŭe mi legis ĉiujn 5 kolektojn de ĉinaj popolaj rakontoj, eldonitajn de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ili estas “Rakontoj pri Afanti”, “Saĝo-Sako”, “La Feliĉa Birdo”, “Papilia Fonto” kaj “Magia Ŝipo”. Ilia beleco profunde impresis min. **BOVISTO KAJ TEKSISTINO** enhavas la rakontojn “Meng Ĝjangnju”, “Bovisto kaj Teksistino”, “Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj” kaj “La Blanka Serpento”. Ili estas laŭdataj kiel 4 plej elstaraj popolaj rakontoj de Ĉinio. Oni povas diri, ke ili estas bone konataj de ĉiuj familioj en Ĉinio. Mi bone memoras, ke en mia infaneco mi plurfoje ĝuis la rakontadon de mia avino pri Bovisto kaj Teksistino. La tiama kamparo ankoraŭ ne havis elektran lampon. En somera vespero, sur la ĉielo briletis steloj kaj sur la tero gemaljunuloj sidis kune kaj babilis por sin refreŝigi, dum ni infanoj ludis laŭvole kaj silentis nur tiam, kiam ili rakontis al ni historieton. Aŭskultinte la rakonton pri Bovisto kaj Teksistino, ni rigardadis al la ĉielo kaj serĉadis la stelojn Bovisto (Altairo) kaj Teksistino (Vego), fingre montrante. Pro sciemo ni ofte haltis antaŭ

bovo por aŭskulti, ĉu ĝi scias paroli kiel homo ... 50 jaroj pasis. Kiam mi legis la rakonton pri Bovisto kaj Teksistino, mi sentis min kvazaŭ en mia infaneco. Bovisto kaj Teksistino estas steloj sur la ĉielo laŭ la ĉina astronomio. Oni asociis la miton pri la amo de la steloj kun la ĉina popola rakonto pri la amo de diino kaj homo. En pli ol 2 000 jaroj la rakonto cirkulis de buŝo al buŝo kaj fariĝis kompleta kaj korusa amrakonto.

En Ĉinio ĉiuj alilandaj turistoj senescepte vizitas la Grandan Muron, alie ili multe bedaŭros, ĉar la Granda Muro estas rigardata kiel unu el la mirakloj en arkitektura historio de la mondo. Sed kiu scias pri la malfaciloj en la konstruado de la Granda Muro? “Meng Ĝjangnju” estas rakonto tiurilate cirkulanta de pli ol 1 000 jaroj.

La Unua Imperiestro (259-210 a. K.) de Qin-dinastio (Ŝihuang) kaj imperiestroj de la dinastio Norda Qi (550-577) mobilizis centmilojn da popoloj por konstrui la Grandan Muron. En la ĉina historio, la Unua Imperiestro de Qin-dinastio plenumis la grandan aferon por unuigi Ĉinion kaj pro tio faris neforigeblan meriton. Sed li mobilizis pli ol duonon de la laborfortoj de la lando al la konstruado de la Granda Muro kaj palacoj. La peza laborego kaj kruela puno tre multe suferigis la popolon. Popola verkisto poluris la rakonton pri la konstruado en kompletan legendon, kiu cirkulas tra la tuta lando. Oni prikantas la fidelan amon de Meng Ĝjangnju kaj skurĝas la tiranojn kun la Unua Imperiestro de Qin-dinastio kiel reprezentanto.

“Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj” priskribas aŭtentikan okazaĵon en historio. La geamantoj vivis en la dinastio Orienta Jin (317-420). Ĝu Jingtaj, inteligenta knabino de klerula familio, devis alivesti sin kiel viron por lerni aliloke pro tio, ke en la feŭda Ĉinio estis malpermesite al la virinoj viziti lernejon aliloke. Post 3-jara kunlernado ŝi kaj Ljang Ŝanbo fariĝis intimaj geamikoj. Sed la lasta, honesta junulo, ne rimarkis, ke Jingtaj estas knabino. Poste, Jingtaj devis hejmenreveni laŭ la ordono de sia patro. Sur la vojo al la hejmo, Jingtaj, akompanata de Ŝanbo, montris sian amon al li, metafore utiligante pejzaĝojn. Sed Ŝanbo ne kaptis la kaŝitan ideon. Poste, la instruista edzino informis lin pri la vero kaj Ŝanbo tuj venis al la hejmo de Jingtaj por peti ŝian manon. Sed, tiam la patro de Jingtaj jam fianĉinigiis ŝin al la filo de tiea gubernatoro. Malsukcesinte, Ljang Ŝanbo revenis hejmen kaj des pli sopiris al Jingtaj. Tute malespera, li grave malsaniĝis kaj post nelonge mortis. Informite pri lia forpaso, Jingtaj dronis en granda malĝojo. Ŝi petis de sia patro permesi al ŝi diri adiaŭ al Ŝanbo antaŭ lia tombo. En la geedziĝa tago, kiam la palankeno de Jingtaj pasis preter la tombo de Ŝanbo, Jingtaj descendis ĝin kaj venis antaŭ la tombon. Subite, la tombo ekfaŭkis kaj Jingtaj senprokraste sin ĵetis en ĝin tra la fendado. Je la momento la tombo refermiĝis. Oni diras, ke la geamantoj transformiĝis en birdojn (aŭ papiliojn) kaj flugis en densan arbaron de Ljangŝan-monto. De tiam ili estis kune. En Ĉinio oni rigardas Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj kiel simbolon

de fidela amo. Emociitaj de la korŝira tragedio de Ljang Ŝanbo kaj Gu Jingtaj, sennombraj gejunuloj strebis al la libereco de geedziĝo.

La rakonto "La Blanka Serpento" aperis plej malfrue. Ĝia enhavo senĉese ŝanĝiĝis kun historia evoluo. Oni priskribis la Blankan Serponton kun malica spirito kiel virinon belspiritan kaj fidelan al amo. Blanka estis senkulpe enterigita de bonzo Fa Haj sub la pagodo Lejfeng per magio, pro tio, ke ŝi amis junulon Ŝju Ŝjan. Blanka savigis, nur kiam la pagodo disfalis. Dank' al tio, ke en 1929 la pagodo Lejfeng disfalis, ne riparite dum multaj jaroj, la intrigo de "La Blanka Serpento" havis gravan ŝanĝigon. Homoj informis unu alian, ke Nigra, intima amikino de Blanka, revenis de malproksima montaro post ekzercado, venkis Fa Haj, renversis la pagodon Lejfeng kaj savis Blankan, kiu estis malliberigita dum pli ol mil jaroj. El tio videblas, kiom evidentiĝas la amo

kaj malamo de la popolo.

La kolekto, kun ĉ. 24 000 vortoj kaj 9 ilustraĵoj de homfiguroj, estas kompilita laŭ multaj legendoj. En la kompilado partoprenis profesoro Ĝong Ĝing'ŭen, fakulo pri folkloroj, s-ro Je Ŝengtaŭ, fama erudiciulo kaj edukisto, Hŭa Ĝjiĉing kaj Ĝang Ziĉeng, fakuloj pri kolektado kaj kompilado de folkloroj. La desegnaĵo sur la kovrilo figuras paron da ambirdoj, kio klare prezentas la ĉefan temon de la kolekto. En Ĉinio oni rigardas ambirdojn kiel simbolon de geamantoj.

La Esperanta traduko de la kolekto estas flua kaj facile legebla.

Kompreneble, ĉiuj bonaj verkoj, inkluzive de la nuna, ne estas perfektaj. Mi opinias, ke iuj frazoj ne estas bone tradukitaj. Ekz., sur la paĝo 20 estas la frazo "Sed ĉiu firme asertis, ke neniŭ scias la kieon de Teksistino." La tradukinto komplikis simplan tradukon, substantivigante "kie" kaj alme-

tante al ĝi akuzativon, por respondi al gramatika bezono. Jen alia ekzemplo, sur la paĝo 30 oni legas la frazon "Ili nun alproksimiĝis al la Longa Pavilono, 10 liojn for de la urbo Hangĝoŭ." La diro "longa pavilono" estas vere malfacile komprenebla. Ĉu pavilonoj estas dividitaj en longan kaj mallongan?

Troviĝas en la kolekto ankaŭ iuj preseraroj. Sur la paĝo 12 legiĝas la frazo "Ambaŭ kune pasigis la agojn kaj noktojn." La vorto "agojn" devas esti "tagojn". Sur la paĝo 30 estas la frazo "Ŝi daŭrigis la vojadon sen returni la kapon al Ŝanbo..." Ĉi tie la vorto "vojadon" devas esti "vojaĝon" kaj alia frazo sur la sama paĝo "Jes, sed ĉi tie nur bovistoj, kaj neniŭ teksistino." La vorto "bovistoj" devas esti uzata en singularo. Mi rimarkis en la kolekto malmultajn gramatikajn erarojn, kaj mi ne mencias ilin unu post alia. Mi kredas, ke tiuj mankoj ne malhelpos al niaj legantoj ĝui la belecon de la kolekto. ■

POR KOMENCANTOJ

GOTTFRIED HOFSTÄTTER (Aŭstrio):

Sinjoro Segemann

S-ro Gottfried Hofstätter estas nia fidela abonanto de pli ol 20 jaroj. La 18-an de novembro 1989 li festis sian 80-an naskiĝtagon. Malfrue informite pri tio, ni tamen deziras al li bonfarton.

La Red.

Dum pluveta, antaŭtagmeza horo rapidas viro al la stacidomo. Survoje alparolas lin konato: "Kien vi rapidas, mia amiko?" "Pardonu," respondas la alparolito, "mi devas atingi la jam preskaŭ forveturantan trajnon; mia fratino telefonis, ke mi tuj venu; nia patrino eble jam ne plu transvivos la hodiaŭan tagon." Kaj li pluen hastas.

Veninte en la stacidoman halon, li strebas al la giĉeto, sed bone vestita, flegita sinjoro tie estas tuj demandonta ion. La hastanto nerveze petas: "Moŝta sinjoro, ĉu vi permesas, ke mi antaŭiru? Mia trajno en kelkaj minutoj ekveturos." la alparolito afable kapjesas kaj liberigas la giĉeton. La viro petas vetur-

bileton al Altenbach. "96 ŝilingojn" postulas la ofiĉisto, eldonante la bileton. La mano de la viro ŝoviĝas en la pantalonan poŝon, sed ĝi estas jam ektimigite eltirita, kaj haste serĉas la manoj nun en la aliaj vestaj poŝoj — vane. "Aĥ, mia Dio!" suspiras la viro embarasite. "Pro la rapidado mi forgesis mian monujon — kaj mia patrino..., kiu... kion mi nun faru?" Apenaŭ li finas tiun ĉi frazon, jen jam la afabla sinjoro malantaŭ li, kiu lin antaŭen lasas, metas 100-ŝilingan bankbileton sur la giĉetan breton. "Segemann," li aldiras. La viro iom honteme respondas: "Steger, Konrad Steger, sed..." "Tio havas tempon, sed vi nun ne," respondas Segemann kaj donas al la embarasita viro la vizitkarton. "Aŭ, ĉu vi bezonas pli da mono?" li ankoraŭ aldiras. "Ne, sinjoro, multan dankon! En Altenbach ja estas miaj fratino kaj frato." Kiam Steger volas doni la adreson al la helpinto, tiu grandgeste rezignas kaj ege urĝas lin: "Rapidegu jam!!" — Steger feliĉe en plej lasta momento ankoraŭ povas salti sur la ekveturintan trajnon.

Kiel observinto de tiu spontanea helppreteco de tiu sinjoro Segemann, mi estis tre kortuŝita. Sed ankaŭ la emocio kaj respekto de la alia pro tia konfido tre profunde impresis min. La varma lumo en ties okuloj diris al ĉiu: tiu ĉi homo ne fiuzos la donacitan konfidon kaj ĉiam estos dankema al tiu helpinto. ■



Sovetiaj baletistoj en Ĉinio

Teksto de WEI RAN

Fotoj de HAI FENG

LA Baleta Trupo de la Granda Ŝtata Modela Teatro de Sovetunio estas unu el la kvin grandaj baletaj trupoj en la mondo. Septembron 1989 ĉinaj spektantoj bonŝance aprecis baletan prezentadon de la sovetiaj baletistoj. Ne fremda estas la baleta trupo al ĉinaj spektantoj. En 1959 la trupo faris prezentadon en Ĉinio, la brila figuro de blanka cigno

Sceno el la baletoj "Cigna Lago"

ludita de la fama baletistino G. Ulanova en "Cigna Lago" donis al la ĉinaj spektantoj neforgeseblan impreson. La trupo de la ĉifoja prezentado en Ĉinio havis 133 membrojn, kiuj superas duonon de tiuj de la teatro kaj plejparte estas junaj baletistoj.

Ĉifoje en Ĉinio ili prezentis la baletan "Spartako". En reĝisorado de la epopea milita temo Grigoriĉ, ĉefa koregrafo-reĝisoro de la trupo, aplikis majstran manieron.



Sceno el la baletto "Nuksrompilo"


En la baletto ne estis bagatelaj realaj scenoj de luktado inter la ribelaj sklavo kaj trupoj de la Romana Imperio, nur kontraŭstaro, antaŭenmarŝo kaj retropaŝo inter la du armeoj. En traktado de la fiasko de la ribelantoj, la reĝisoro simple prezentis, ke Spartako estis mortigita sub armiloj de la malamikaj soldatoj. Tio sentigis la rigardantojn, ke li vivis brave kaj mortis heroe, li meritis esti vera heroo. La prezenta stilo estis serioza kaj pensiga, sen parado kaj troigo.

Krome, la artistoj okazigis vesperan kunvenon kun mallongaj klasikaj programeroj. La trupo prezentis ses fojojn en Pekino kaj turneis en Ŝanhajo, Hangzhou kaj Nankino. ■



Sovetiaj baletistoj en la Somera Palaco de Pekino

Foto de ZHANG SHUXIN



Sceno el la baletto "Spartako"

Chuntao

de LIU CHUNMAO

TIO okazis en Ĉinio en la 30-aj jaroj. Kamparana knabino Chuntao, perforte disigite de banditoj en la geedziĝa vespero, venis sola en Pekinon kaj vivtenis sin per kolektado de ĉifonoj.

Interkonatiĝinte unu kun la alia en katastrofo, Chuntao kaj fraŭlo Liu Xianggao kunvivis, amante unu la alian kiel geedzoj. Xianggao, fortika kaj honesta, multe zorgis pri Chuntao, dum ŝi, laborema kaj kapabla, bezonis helpon de viro. Ĉiutage, Chuntao kolektis eluzitajn paperpecojn kaj Xianggao ilin ordigis hejme. Poste, ili ŝanĝis la paperpecojn kontraŭ alumetoj kaj vendis ilin por vivtenado.

La tradicia ĉina moro ne per-

mesas tian eksteredzegan kunivadon. Sed en la milita periodo, la najbaroj, ne volante interveni en alies aferojn, persvadis, ke ili oficialigu sian geedzecon. Tion firme rifuzis Chuntao. Ŝi eĉ ne permesis, ke Xianggao ŝerce nomu ŝin edzino.

Iutage, kiam Chuntao kolektis ĉifonojn sur strato, subite ŝi aŭdis, ke iu nomis ŝin per bebnomo. Returniĝinte, ŝi surprize rimarkis, ke iu viro, en ĉifona uniformo kaj amputita je la gamboj, sidas sur la tero kaj rigardas ŝin. Li estis neniu alia ol ŝia edzo Li Mao. Disigite en la geedziĝa vespero, li estis kaptita kaj soldatigita. En milito li perdis ambaŭ gambojn. Li povis fari nenion krom almozpeti. Chuntao senprokraste vokis rikiŝiston por veturigi lin en ŝian hejmon.

La reapero de Li Mao subite ŝanĝis la vivmanieron de Chuntao. Kiel devis vivi plu unu virino kaj du viroj sur unu terlito en duondomaĉo?


Chuntao firme decidis vivi kune kun ambaŭ viroj kaj asertis al ili, ke ŝi apartenas al neniu el ili. La viroj dronis en embaraso. Li Mao bedaŭris "eniri" tiun ĉi hejmon. Kvankam li ne plu maltrankviligis pri vestado kaj manĝado, tamen li pli ĉagreniĝis morale ol iam antaŭe. Li ne povis foriri de tie pro manko de gamboj. Ankaŭ Xianggao multe suferis de konfliktoj en la koro. Li opiniis, ke li devas eviti tian vivon, ĉar Li Mao estis la edzo de Chuntao. Sed fakte, Xianggao vivis kun ŝi kiel geedzoj dum multaj jaroj kaj arde ŝin amis. Estis malfacile por li disigi de la amatino.

Rigardante Li Mao kiel sian fraton, Xianggao donis al li vestojn kaj faris por li lambastonojn. Siaflanke Li Mao estis dankema al Xianggao. Sed tamen, ĉio ĉi tio ne povis ĉesigi la subtilan rilaton inter unu virino kaj du viroj. Finfine, Xianggao ŝtele foriris.

Post la foriro de Xianggao, Chuntao vidis, ke ŝi ne povas vivi sen li, ĉar ŝi ne nur bezonis lin en la vivo, sed ankaŭ amis lin el la koro. Ŝi forlasis la hejmon kaj serĉis lin, sed vane. Hejmenreveninte lacega, ŝi rimarkis, ke Li Mao sin pendigis. Savinte lin, ŝi ekvivis sekan vivon kune kun li kiel gefratoj.

Vaginte ekstere malvigla kel-

Reĝisoro Ling Zifeng (la dua de dekstre) kaj aktoroj





Chuntao en Pekino

Chuntao kuracas Xianggao per plastro.





Chuntao kaj Liu Xianggao

kajn tagojn, Xianggao decidis reveni hejmen. Li bone komprenis, ke li ne povas vivi sen Chuntao kaj la lasta ne povas disiĝi de li.

Li Mao tre ĝojigis pro ilia rekuŝo.

La filmo "Chuntao" estas adaptado de la samtitola romano de Xu Dishan, fama verkisto de la 30-aj jaroj, kaj reĝisorita de Ling Zifeng. Grandaĝa s-ro Ling reĝisoris multajn elstarajn filmojn, kiaj


"Kanto de Ruĝa Flago" kaj "Landlima Urbo", kaj iuj el ili gajnis premiojn en internaciaj filmofestivaloj. Li bone scias adapti famajn literaturajn verkojn al filmoj kun rafinita stilo kaj profun-



Chuntao kaj Li Mao en la hejmo

da signifo. "Chuntao" estas bonvenigata de la rigardantoj kaj gajnis la premion de elstara filmo donitan de la ŝtato en 1988.

Liu Xiaoqing ludis la rolon de Chuntao. Ŝi, fama stelulino en la lastaj dek jaroj, estas kompetenta ludi la rolon de virino kuraĝa, decidema kaj inteligenta. Liu Xianggao estas ludata de Jiang Wen, juna aktoro prosperanta de la lastaj jaroj kaj ĉefrolulo de la filmo "Ruĝa Sorĝo", kiu gajnis la premion "Ora Urso" en la Filmfestivalo de Okcidenta Berlino. Dank' al sia kompetenteco en la arto, li estas konsiderata kiel unu el la plej promesplenaj aktoroj en Ĉinio. Li Mao estas ludata de neprofesia aktoro Cao Qianming. Li estas kriplulo kaj bone ludis la rolon. ■



Chuntao kaj la du viroj sur sama terlito

Liu Xianggao faras lambastonojn por Li Mao.



Liu Xianggao revenas post vagado.





FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Norda rivero de birdflugo

de ALEKSANDR KOVALJOV (USSR)